

eLIBRO

William Shakespeare

La Venecia komercisto

I N K O

William Shakespeare

LA VENECIA KOMERCISTO

(The Merchant of Venice)

El la angla tradukis Alfred E. Wackrill

Lingve reviziita en 2003

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-199-2

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

MAJO 2003

ANTAŬPAROLO

*E*n plej malluma horo mi sendas al la presisto la manuskripton de La Venecia Komercesto. Eŭropo en la nuna momento sufokas sin, baraktante en la plej terura militado, kiun iam la mondo subiĝis; kaj okupas la animojn de homoj sole la pensoj pri milita agado kaj la sekvanta universala ruiniĝo de ĉio, kio rilatas al la vera bonstato de l' homaro. En tiaj cirkonstancoj ŝajnas eĉ infane eldoni libreton traktanta pri la spiritaj sentoj de homoj apartenantaj al anguleto de la fantazia mondo kaj al malproksima mond-aĝo. Ĝi estas kvazaŭ malgranda voĉeto fluŝtranta inter la furioza tondrado de la pafalegoj. Tamen ĝi estas simbolo de io pli alta kaj pli sankta ol la nuna infera aktualaĵo: ĝi signalas ĉe ni Esperantistoj la senmortan esperon, ke venos tempo, kiam la homa inteligento ne plu montros sin en la formo de frenezeco detruema, kiam ni homoj vere komprenos, ke amo kaj servemo estas pli nobla stato, kaj eĉ pli profita por ĉiuj, ol la reciproka krueleco kaj pereigemo.

En la tradukado mi ĉiam penis fidele kondukti rilate la genian aŭtoron de *The Merchant of Venice*, kiel ankaŭ rilate la *Zamenhofan* lingvon Esperanto; tamen mi akre konscias, ke ekzistas difektoj en mia traduko, se nur paroli pri

la sonoreco de la originalo. Malgraŭ ĉio mi kuraĝas esperi, ke ĝi troviĝos leginda por tiuj, kiuj ne konas la anglan lingvon, kaj eĉ klarigos por anglolingvanoj multajn parolmanierojn jam post la XVI-a jarcento fariĝintajn arkaikaj.

Alfred E. Wackrill.

Hampstead, la 28-an de sept., 1914

PERSONOJ DE LA DRAMO

Duko de Venecio

Princo de Maroko }
 Princo Aragona } *edziĝopetantoj al Portia*

Antonio, *komercisto Venecia*

Bassanio, *ĉi ties amiko kaj edzigopetanto al Portia*

Salanio }
 Salarino } *amikoj de Antonio kaj Bassanio*
 Gratiano }

Lorenzo, *amindumanto de Jessica*

Shylock, *riĉa hebreo*

Tubal, *hebreo, amiko de ĉi tiu*

Launcelot Gobbo, *kamparano, servisto de Shylock*

Maljuna Gobbo, *patro de Launcelot*

Leonardo, *servisto de Bassanio*

Balthasar }
 Stephano } *servistoj de Portia*

Portia, *riĉa heredantino*

Nerissa, *ĉi ties domanino*

Jessica, *filino de Shylock*

Grandsinjoroj Veneciaj, oficistoj de la tribunalo, karceristo, servistoj de Portia kaj aliaj akompanantoj

Scenejo — Jen en Venecio, jen en Belmont, la kampodomo de Portia, sur la kontinento.

AKTO UNUA

SCENO I.

En Venecio. Sur strato.

Eniras Antonio, Salarino kaj Salanio.

ANTONIO Nu, vere ne komprenas mi la kaŭzon de mia malgajeco; min ĝi ĝenas, kaj vin, laŭ via diro; tamen kiel mi kaptis, trovis, aŭ ricevis ĝin, el kio ĝi konsistas, aŭ naskiĝis, ankoraŭ mi ne scias; kaj tia malspritulo min ĝi faras, ke mi apenaŭ min rekonas mem.

SALARINO Animo via sur la oceano balanciĝadas kun ŝipegoj viaj grandvelaj, kiuj, kvazaŭ grandsinjoroj kaj riĉaj burĝoj, aŭ paradaj monstroj, de alte la komercetistojn marajn la per salutaj flagoj honorantajn, rigardas nur kaj preterflugas ilin per tolaj la flugiloj.

SALANIO

Kredu min,
sinjoro, se hazardoj tiaj min
rilatus, tiam pli ol la duono
de miaj pensoj sekvus ilin for.
Per herbo deŝirita mi senĉese
provadus la direkton de la vento;
esplorus mi markartojn por havenoj,
por kaĵoj, rodoj. Certe malgajigus
min ĉio nur povanta malbonigi
riskitan la miaĵon.

SALARINO

Se blovus mi sur supon,
tuj mi frosttremus ĉe la penso, kiom
da perdo povus kaŭzi marventego.
Se vidus mi horloĝon sabloŝutan,
mi revus tuj pri maraj malprofundoj
kaj vidus, kiel luksa mia ŝipo
Andreo, implikite en sablaro,
topvelon sian klinas pli malalten
ol kilo, por ekkisi sian tombon.
Se, en preĝejon enirinte, mi
la ŝtonojn de la sankta konstruaĵo
rigardus, tiam mi danĝerajn rokojn
pripensus, kiuj, flankon nur tuŝinte
de la nobela ŝipo, ŝutos for
sur maran vaston la spicaran ŝarĝon
kaj silkojn miajn vestos al marondoj.

Jen ĵuse, grandvalora posedaĵo:
jen, post momento, jam nenio restas.
Ĉu mi pri malĝojigaj ŝancoj pensus,
ne pripensante ankaŭ la malĝojon?
Ne diru "ne," ĉar certe pro komercaj
zorgegoj malgajadas nun Antonio.

ANTONIO Kredu, ke ne; ĉar, dank' al la Fortuno,
disponas mi nek sole unu ŝipon,
nek lokon solan, por hazardoj miaj;
nek mia tuta haveco nur dependas
de la bonŝanco de la nuna jaro.
Do, ne komercaj zorgoj min depremas.

SALARINO Do, enamiĝis vi.

ANTONIO Fi! kia penso!

SALARINO Ne enamiĝis ankaŭ? Do ni diru,
ke vi malgajas, ĉar vi nur ne gajas.
Sed kial vi egale ne saltadu
kaj ridu, diru, ke vi estas gaja
pro tio, ke malgaja vi ne estas?
Nu, pro dukapa Janus, la Naturo
de temp' al tempo kreas strangajn homojn.
Jen unuj, kun pupiloj duonplenaj,
ridegas ĉiam, kiel papagetoj
ĉe sakfajfisto; jen aliaj, kiuj
aspekton tiel vinagrecajn portas,
ke ili ne malkaŝos siajn dentojn

ridete, eĉ en la okazo se
Nestoro mem ridegos pri la ŝerco.
Eniras Bassanio, Lorenzo kaj Gratiano.

SALANIO Ha, jen Bassanio, via altnobela
parencio, kun Gratiano kaj Lorenzo.
Adiaŭ! nun ni lasas vin pli bone
akompanotajn.

SALARINO Mi volonte restus
ĝis mi gajigus vin, se ne malhelpus
amikoj pli meritaj.

ANTONIO Vian indon
tre alte ŝatas mi. Aferoj viaj
sendube vokas vin kaj oportuna
vi trovas la okazon por foriri.

SALARINO Saluton, viaj moŝtoj.

BASSANIO Diru vi,
sinjoroj, kiam do ni povos ridi?
Vi fremduliĝas; ĉu ĝi devas esti?

SALARINO Ni vin vizitos laŭ okazo via.

Eliras Salarino kaj Salanio.

LORENZO Moŝta Bassanio, ĉar Antonion nun
vi trovis, ni forlasos vin, sed vi
volu memori, je tagmanĝa horo,
la lokon de reenkontiĝo nia.

BASSANIO Mi nepre venos.

GRATIANO

Vi, sinjor' Antonio,
aspektas malbonsana. Mondaferoj
tro multe vin implikas. Se per zorgo
aĉetas homo mondon, li ĝin perdas.
Mirinde vi sangiĝis, efektive.

ANTONIO

Por mi la mondo, Gratiano, estas
la mondo simple: teatraĵo, kiu
el ĉiu homo eldevigas rolon,
el mi — malĝojan.

GRATIANO

Kaj el mi la rolon
de ŝercemulo. Gaje kaj ridante
ricevu mi la sulkojn maljunecajn.
Pli bone trovarmigi la hepaton
per vino, ol frostigi per ĝemado
la koron mian. Ĉu al homo decas,
en kiu fluas varma sango, sidi
simila al statuo alabastra
de sia avo; dormi maldormante,
kaj pro malafableco sia rampi
en flavmalsanon? Aŭdu min, Antonio,
(Nur ĉar mi amas vin mi tion diras.)
ekzistas tiaj, kies la vizaĝoj
similas kruston ŝliman de laĝeto,
kaj senmovecon intencitan montras
nur por akiri famon de saĝulo,
seriozulo kaj profundpensanto

kun pozo: *Jen mi Moŝta Orakolo;
neniu hundo boju miajn vortojn!*
Antonjo mia, konas mi tielajn
laŭfame saĝajn nur per silentado;
sed, se parolus ili, tiam nepre
kondamnon ili trudus al aŭdantoj
nomantaj ilin, fratojn, "malsaĝuloj".
Mi alifoje tion plu parolos.

Ne penu, per logilo la malĝojo,
gobion vantani kapti — tiun famon!
Bona Lorenzo, venu. Ĝis revido;
mi finos la predikon post tagmanĝo.

LORENZO Ni do vin lasos ĝis tagmanĝa horo.
El tiuj mutsaĝuloj, kompreneble,
mi nepre estas, ĉar Gratiano min
neniam lasas vorton eĉ paroli.

GRATIANO Min akompanu plu nur jarojn du:
vi eĉ ne konos vian propran voĉon.

ANTONIO Adiaŭ! babilema mi fariĝos.

GRATIANO Bone; ĉar la silento ne konvenas
krom al bovlango sekigita, aŭ
knabino ne svatebla.

Eliras Gratiano kaj Lorenzo.

ANTONIO Nu, ĉu tio estas io?

BASSANIO Gratiano parolas teruran kvanton da nenio, eĉ
pli multe ol ĉiu viro en tuta Venecio. Liaj pen-

soj estas kvazaŭ du grajnoj tritikaj kaŝitaj en du buŝeloj da grenventumaĵo: tutan tagon vi serĉos ilin antaŭ ol vi trovos; kaj trovite ili ne valoras la serĉadon.

ANTONIO Nu, diru min pri tiu sinjorino, al kiu vi vin ĵuris pilgrimanto sekreta, kun promeso, ke hodiaŭ rakontos vi al mi.

BASSANIO Antonio, certe vi ne nescias, kiom mian havon kripligis mi, pli multe paradante ol, laŭ rimedoj miaj, povis daŭri. Jam nun ne plendas mi, ke malpli brave mi devas nun elspezi; ĉefe mi deziras dece liberiĝi for de grandaj ŝuldoj, kiuj min implikis en tempo de tro granda malŝparemo. Al vi, Antonio, mi plej multe ŝuldas rilate ĉu al mono ĉu al amo; kaj via amo kvazaŭ min rajtigas malkaŝi miajn planojn kaj intencojn por neniigi ĉiun mian ŝuldon.

ANTONIO Bassanio mia, diru ĝin, mi petas; kaj se ĝi staras, kiel ĉiam vi, en sfero de honoro, estu certa,

ke por dispono via malŝlosiĝis
kaso, persono kaj rimedoj miaj.

BASSANIO En lernaj jaroj, sagon se mi perdis,
mi pafis sandirekten egalulon,
pli vigle observante ĝin; kaj ofte,
riskinte duan, ambaŭ mi trovadis.
Pri tiu knaba provo mi aludas
ĉar tre naive mi parolos nun.
Multon al vi ŝuldante, pro juneca
senzorgo ĝin mi perdis tutan; tamen
se plaĉos vin ekriski sandirekten
ankoraŭ unu sagon, mi ne dubas,
ke mi, la flugon observinte, savos
duopan sumon eble, aŭ almenaŭ
la duan certe; kaj mi restos tiam
danka ŝuldanto via pro l' unua.

ANTONIO Konante min, vi nur la tempon perdas
ĉirkaŭvortante mian amikecon.
Certe vi pli ofendas min, dubante
pri mia volonteco ĝis ekstremo,
ol se vi jam tradandus mian havon.
Diru vi nur, mi kion devas fari
(se scias vi, ke decas, ke mi faru),
kaj mi tutpreta estas; do parolu.

BASSANIO En Belmont loĝas riĉe heredinta
fraŭlino, bela kaj, pli grave, ankaŭ

mirinde virta; la okuloj ŝiaj
al mi sendadis iam, ne per vortoj,
parolojn dolĉajn. Portia ŝi nomiĝas,
neniel malpli inda ol Porcia
filino de Katono kaj edzino
de Bruto. Ankaŭ en la vasta mondo
ne estas nekonata ŝia indo;
ĉar ventoj kvar el ĉiuj bordoj blovas
petantojn pri edziĝo eminentajn.
Tempiojn ŝiajn ornamadas bukloj
sunaj, simile al ŝafvesto ora,
kaj faras el loĝejo ŝia, Belmont,
veran Kolĥosan bordon, kie ŝin
Jasonoj serĉas multaj. Ho, Antonio,
amiko, se mi havus nur rimedojn
konkuri inter ili, antaŭsento
spiriton mian tenas, ke sendube
sukceson trafus mi.

ANTONIO

Vi scias mem,
ke mia tuta haveco estas nun
sur maroj. Monon mi ne havas, nek
vendeblan komercaĵon; iru do;
provu la forton de kredito mia
en Venecio. Tio ĝis ekstremo
streŝata nepre estu, por ebligi
al vi, viziti la belegan Portian

en Belmont. Iru, eldemandu tuj
(mi ankaŭ faros same) pri havebla
monsumo; kaj sendube mi ricevos,
ĉu pro kredito, ĉu pro amikeco.

Ili eliras.

SCENO II.

En Belmont. Ĉambro en la domo de Portia.

Eniras Portia kaj Nerissa.

PORTIA Je mia honoro, Nerissa, mia korpeto enuiĝis
pro tiu ĉi mondego.

NERISSA Laca vi estus, kara sinjorino, se viaj mizeroj
abundus same kiel viaj feliĉoj; tamen, laŭ mia
observo, tiom malsanas la sategantaj pro tro-
aĵo, kiom la malsatigantaj pro absoluta man-
ko. Ne malŝatinda do estas la bonŝanco okupi
la mezan lokon; la trohavo pli rapide ricevas
blankajn harojn; sed la sufiĉhavo vivas pli lon-
ge.

PORTIA Bonaj sentencoj kaj bone elparolitaj.

NERISSA Ankoraŭ pli bonaj, se bone observataj.

PORTIA Se estus same facilaj la sciado kaj la farado de
la konveno, tiam preĝejetoj estus preĝejegoj
kaj la kabanoj de malriĉuloj estus princaj pala-

coj. Tiu estas bona predikisto, kiu sekvas mem sian instruon. Mi pli facile povas instrui dudekon pri konveneco ol, kiel unu el dudek, sekvi mian propran admonon. La cerbo povas elpensi regulojn por la sango, sed arda temperamento transsaltas dekreteton malvarman. Vera leporo estas tiu junulo, la frenezeco por transsalti la retojn de l' kriplulo la bonkonsilo. Sed tiu ĉi babilado ne taŭgas por elekti al mi edzon. Tamen, kia vorto, "elekti"! Mi povas nek elekti, kiun mi volas, nek malakcepti, kiun mi malŝatas; tiel la simpla volo de vivanta filino estas bridita per la testamenta volo de mortinta patro. Ĉu tio ne estas malagraba, Nerissa, ke mi povas nek elekti unu, nek malakcepti alian?

NERISSA

Via patro estis ĉiam virta; kaj piaj homoj ĉe sia morto havas bonajn inspirojn; tial la loterio, kiun li aranĝis kun tiuj tri kestetoj el oro, arĝento kaj plumbo, tiel ke la divenanto de lia intenco elektas ankaŭ vin, nepre estas tia, ke neniu iam divenos ĝin krom viro, kiu bone vin amos. Sed kia varmo ekzistas en viaj sentoj al iu el tiuj petontaj princoj, kiu ĝis nun venis?

PORTIA

Nomu ilin, mi petas; kaj kiun vi nomos, tiun mi pridiros; kaj laŭ mia pridiro vi konjektu pri mia sento.

- NERISSA** Unue do, la princo Napola.
- PORTIA** Jes, vera ĉevalido li estas, ĉar pri nenio li parolas krom pri sia ĉevalo. Grandan aldonon li alkalkulas al siaj kvalitoj en tio, ke li povas mem subforĝi ĝin. Multe mi timas, ke sinjorino lia patrino maldiskrete kondukis kun iu forĝisto.
- NERISSA** Tiam la grafo Palatina.
- PORTIA** Ĉiam li sulkigas la frunton kun mieno kvazaŭ li volus diri: *Se vi ne volas min, elektu*. Aŭskultante gajajn rakontojn, li ne ridetas. Mi timas, ke li fariĝos, maljuniĝante, ploranta filozofo, ĉar en sia juneco li estas tiel malafable malgaja. Prefere mi edziniĝus kun skulptita kranio tenanta oston en sia buŝo, ol kun unu el tiuj. Dio gardu min kontraŭ la du!
- NERISSA** Kion vi diras pri la franca nobelo, Monsieur le Bon?
- PORTIA** Dio faris lin, do li estu kalkulata kiel homo. Vere mi scias, ke estas peke esti mokemulo; tamen — li! Nu, li havas pli bonan ĉevalon ol la Napolano, pli bonan kutimaĉon kuntiri la brovojn ol la grafo Palatina; li, estante neviro, estas ĉiu viro; se turdo ekpepas, tuj li komencas danci; li skermus kun sia propra ombro. Se mi edziniĝus kun li, mi estus edzino de dudek edzoj. Se li bonvolus malŝati min, mi pardonus

al li; ĉar, se li amos min ĝis frenezeco, mi neniam rekompencos lin.

NERISSA Do, pri Falconbridge, la juna barono el Anglujo, kion vi diras?

PORTIA Vi scias, ke pri li mi nenion diras; ĉar mi ne komprenas lin, nek li min. Nek la latinan, nek la francan, nek la italan lingvojn li posedas; kaj vi povus ĵuri antaŭ tribunalo, ke de la angla mi posedas apenaŭ la valoron de unu penco. Li estas bela bildo de viro; sed ve! kiu povus interparoli kun pantomimaĵo? Kiel malegale li estas vestita! Ŝajnas al mi, ke li aĉetis sian ledveston en Italujo, sian pufpantalonon en Francujo, sian ĉapon en Germanujo kaj siajn mo-rojn ĉiulande.

NERISSA Kion vi pensas pri lia proksimulo, la alia lordo?

PORTIA Ke li havas en si la komplezemon de proksimulo; ĉar li pruntis de la anglo vangofrapon kaj ĵuris, ke li repagos ĝin al li, tuj kiam li povos. Mi kredas, ke la franco fariĝis garantiulo en la afero, sub kondiĉo de egala rekompenco.

NERISSA Kion vi opinias pri la juna germano, nevo de la duko Saksa?

PORTIA Kun malŝato en la mateno, kiam li estas mal-ebria; kaj kun abomeno en la posttagmezo, kiam li ebrias. En sia plej bona stato li iom

malsuperas homon kaj en la plej malbona li apenaŭ superas beston. En la plej malbona okazo, kiu povos okazi, mi esperas, ke iel mi povos aranĝi ne havi lin.

NERISSA Se li proponos elekti kaj elektos la ĝustan kesteton, tiam, se vi rifuzus akcepti lin, vi rifuzus plenumi la testamentitan volon de via patro.

PORTIA Tial, por evito de la plej malbona, mi petas vin, metu sur la kontraŭan kesteton grandan glason da Rejna vino; ĉar se la diablo estas interne de ĝi kaj tiu tento ekstere, mi konvinkiĝis, ke li elektos ĝin. Ĉion mi faros, Nerissa, pli volonte ol edziniĝi kun spongo.

NERISSA Vi ne devas timi, sinjorino, ke vi havos iun el tiuj nobeloj. Ili sciigis min pri sia intenco, kiu estas ĝuste reiri al siaj hejmoj kaj ne plu ĝeni vin per petado, krom en la okazo, ke vi estas akirebla alimaniere ol laŭ la kondiĉo de via patro rilate al la kestetoj.

PORTIA Se mi vivos ĝis la maljunaĝo de Sibyila, mi mortos ĉasta kiel Diana, se mi ne estos akirita laŭ la kondiĉo de la patra testamento. Mi ĝojas, ke tiu ĉi areto da edziĝopetantoj estas tiel kompleza, ĉar ne estas unu inter ili, pri kies foresto mi simple ne sopiregas; kaj mi petegas Dion, ke li prosperigu al ili la forvojaĝon.

NERISSA Ĉu vi ne memoras, sinjorino, en la tempo de via patro, Venecianon, klerulon kaj militiston, kiu venis ĉi tien kune kun la markizo de Montferrat?

PORTIA Jes, jes, tio estis Bassanio; ŝajnas al mi, ke li havis tiun nomon.

NERISSA Efektive, sinjorino. Li, el ĉiuj viroj, kiujn iam rigardis miaj nelertaj okuloj, plej bone meritis belan sinjorinon.

PORTIA Mi bone memoras lin kaj mi memoras lin inda de via laŭdo.

Eniras servisto.

Nu, kio do?

SERVISTO La kvar vizitantoj serĉas vin, sinjorino, por peti forpermeson. Ankaŭ venis kuriero de unu kvina, la princo de Maroko; li anoncas, ke la princo lia mastro alestos hodiaŭ nokte.

PORTIA Se mi povus tiel kore bonvenigi la kvinan, kiel mi povas adiaŭi la kvar aliajn, mi ĝojus pro lia alveno. Se li havas la emon de sanktulo kaj la vizaĝkoloron de satano, mi preferus, ke li estu por mi pastro ol mastro. Venu, Nerissa. Vi homo, antaŭen. Dum ni fermas la pordegon post unu edziĝopetanto, alia frapas vizite.

Ili eliras.

SCENO III.

*En Venecio. Sur placo.**Eniras Bassanio kaj Shylock.*

- SHYLOCK Trimil dukatoj; he!
- BASSANIO Ĉuste, homo, kaj por tri monatoj.
- SHYLOCK Por tri monatoj; he!
- BASSANIO Por kio, kiel mi diris, Antonio fariĝos garantiulo.
- SHYLOCK Antonio garantios; he!
- BASSANIO Ĉu vi povas helpi? Ĉu vi volas komplezi min? Ĉu mi ricevos vian respondon?
- SHYLOCK Trimil dukatoj por tri monatoj kaj Antonio garantianto.
- BASSANIO Vian respondon pri tio.
- SHYLOCK Antonio estas solida homo.
- BASSANIO Ĉu vi do aŭdis iun aludon pri dubo?
- SHYLOCK Ho, ne, ne, ne, ne! Mia intenco, dirante, ke li estas solida homo, estas komprenigi al vi, ke mi opinias lin sufiĉe firma. Tamen liaj rimedoj estas supozecaj. Li havas ŝipegon naĝanta al Tripoliso, alian al Hindujo; oni diris ankaŭ al mi, sur Rialto, ke li havas trian en Meksikujo, kvaran por Anglujo; kaj aliajn hazardojn li havas, dise metitajn. Tamen-n, ŝipo estas nur tabularo, ŝipanoj estas nur homoj; ekzistas teraj

ratoj kaj maraj ratoj, maraj rabistoj kaj teraj rabistoj, korsaroj kompreneble; kaj ekster tio estas la danĝero pro akvoj, ventoj kaj rokoj. Malgraŭ tio, la viro estas sufiĉohava. Trimil dukatojn; mi opinias, ke mi povas akcepti lian garantian.

BASSANIO Estu certigita pri tio.

SHYLOCK Pri tio mi nepre estos certigita; kaj mi atente konsideros pri la certigo. Ĉu mi povas paroli kun Antonio?

BASSANIO Se plaĉos al vi tagmanĝi kun ni.

SHYLOCK Jes, por flari porkaĵon! por manĝi el la korpoloĝejo, en kiun via profeto la Nazaretano per ĵuro enloĝigis la diablon! Kun vi mi aĉetos kaj vendos, kun vi mi parolos kaj promenos kaj tiel plu; sed mi neniel volas manĝi kun vi, nek trinki kun vi, nek preĝi kun vi. Kiuj novaĵoj sur Rialto? Kiu venas ĉi tien?

Eniras Antonio.

BASSANIO Tio estas sinjoro Antonio.

SHYLOCK *Flanken*

Al servemaĉa impostisto kiel aspekte li similas! Mi malamas en li kristanon, sed plimulte tion, ke li, naiva bubo, pruntedonas pro danko! malplibonigante tiel

ĉe ni la pruntprofiton Venecian.
 Se nur mi povus koksen premi lin,
*(Li faras geston de luktado, kvazaŭ li levas sian
 homon sur la kokso.)*

mi grase nutrus venĝon la malnovan.
 Nacion nian sanktan li malamas,
 insultas min, en loko plej publika
 por komercistoj, pri marĉandoj miaj
 kaj meritita la profito, kiun
 li procentego nomas. Mian tribon
 malbeno premu, se pardonos mi
 al tiu homo!

BASSANIO

Shylock, ĉu vi aŭdas?

SHYLOCK

Mi konsideras la kontanton mian,
 kaj, nur laŭ la memoro konjektante,
 ne povas tuj kunigi la tutaĵon
 ĝis plena la trimilo da dukatoj.
 Ne grave! Tubal, riĉa samtribano
 hebrea, ĝin liveros. Sed, denove,
 por kiom da monatoj vi deziras?
(Al Antonio)

Sinjor' afabla, mi salutas vin.

Pri via moŝt' plej laste ni parolis.

ANTONIO

Ne kutimante, Shylock, kun procento
 prunti al iu, nek de iu prunti,
 mi nek postulas kreskon, nek ĝin donas.

Mi tamen nun decidis tiun moron
trarompi unu fojon por amiko
premata de bezono.

(Al Bassanio) Ĉu li scias
ankoraŭ, kiom vi deziras?

SHYLOCK

Jes,

dukatojn trimil.

ANTONIO

Kaj por tri monatoj.

SHYLOCK

Jes, mi forgesis, tri monatojn, vere
vi diris tion; do subskribon vian;
kaj plue, — tamen aŭdu; al mi ŝajnas,
vi diris, ke pro kresko vi ne pruntas,
nek done, nek riceve.

ANTONIO

Mi neniam

faradas tion.

SHYLOCK

Kiam Jakob paŝtis
la ŝafojn de Labano, sia onklo —
li, Jakob, post la sankta nia Abram
(laŭ saĝa klopodado de l' patrino)
posedis kiel tria; jes, la tria —

ANTONIO

Kion pri li? Ĉu li procente agis?

SHYLOCK

Ne; ne procente; ne, por tiel diri,
rekte procente. Kiel agis Jakob,
observu. Kiam Laban kaj li mem
konsenton faris pri ŝafidoj, jene:
ke ĉiujn makulitajn kaj striitajn

kalkulos ili kiel rekompenco
al Jakob, (tiam en aŭtun' malfrua
kontraŭ ŝafviroj pasiigis inoj;
kaj ĉe plenumo de l' naskiga ago
inter lanbestoj tiuj, la paŝtisto
bastonojn iajn lerte senŝeligis
kaj metis antaŭ inoj la kovrataj.)
Kaj tiuj gravedigis kaj en tempo
la ĝusta, makulitajn idojn naskis.
Do tiuj ĉi al Jakob apartenis.
Jen estis profitada voj'; kaj li
ricevis benon. Benas ja profito,
se ĝin akiras homoj, ne ŝtelante.

ANTONIO Deĵoris Jakob por hazardo, homo;
ne povis li ĝin realigi. Mano
ĉiela ĝin direktis kaj ordigis.
Ĉu tiel vi pravigas la procenton?
aŭ ĉu la oro kaj arĝento via
geŝafoj eble estas?

SHYLOCK Mi ne scias;
sed mi ĝin igas naski samrapide.
Notu, sinjoro, tamen.

ANTONIO Notu vi, Bassanio,
Satano povas citi la Skribaĵon
por celo sia. Fianimo sanktan
ateston povas citi, sed similas

kanajlon ridetantan, aŭ al pomo
belŝajna putriĝinta ĉe la koro.

Ho, kiel bonaspektas la malvero!

SHYLOCK Trimilo da dukatoj; bela sumo.

Monatojn tri; kaj jara la poeco —

ANTONIO Nu, Shylock, ĉu vi volas nin komplezi?

SHYLOCK Sinjor' Antonio, ofte kaj multfoje

sur la Rialto vi insultis min

pri miaj monoj kaj procentoj miaj;

sed bonmiene mi elportis ĉion,

ĉar toleremo nin distingas gente.

Min malkredanto, ponardista hundo,

nomadis vi kaj mian gabardenon

hebrean malpurigis per kraĉado,

nur ĉar proprajon mian mi uzadas.

Okaze nun, atentu, mian helpon

bezonas vi; vi venas kaj vi diras:

Shylock, ni volas monon; vi, vi diras!

vi, kiu kraĉis mian barbon, kiu

min piedbatis, kvazaŭ trans la sojlon

hundaĉon fremdan: monon vi pripetas!

Kion mi devas diri? Ĉu ne jene:

Ĉu hundo monon havas? Ĉu hundaĉo

trimil dukatojn povas prunti? Aŭ,

kun riverenco, flustra humileco,

premita spiro kaj servuta tono,

paroli jene:

*Afabla moŝto, en merkredo lasta
vi kraĉis min; en certa tago min
vi piedbatis; jen alian fojon
hundo vi nomis min; mi do, pro tiuj
komplezoj, pruntedonos tiun sumon?*

ANTONIO Denove ankaŭ mi verŝajne vin tiele nomos, kraĉos, piedbatos. Se vi konsentas pruntedoni, pruntu ne kvazaŭ al amikoj; ĉar neniam postulis amikeco ĉe amiko rikolton el senfrukta la metalo. Sed pruntu ĝin al malamiko, kiun vi povos sen skrupulo persekuti pro malplenumo.

SHYLOCK Jen, vi furiozas!
Mi nur afablan vian amikecon deziras kaj forgesi ĉiun hontan makulon jam ĝis nun de vi metitan, al vi la nunan mankon tuj forigi, kaj da procento eĉ ne unu speson postuli pro la mono mia; tamen aŭskulti vi ne volas. Mi proponas el bona koro.

BASSANIO Bonkoreco vere ĝi estus.

SHYLOCK Tian bonkorecon tamen
mi montros. Iru tuj al notario
kun mi, sigelu tie dokumenton
personan vian; kaj, pro gajhumoro,
se ne repagos vi en la diritaj
tago kaj loko la diritan sumon,
aŭ sumojn, laŭ kontrakto, tiam estu
punperd' la kondiĉita: ĝusta funto
da karno via bela, fortranĉota
de korpoparto, kiun mi elektos.

ANTONIO Tre kontentige; tion mi sigelos
kaj la hebreon nomos tre bonkora.

BASSANIO Pro mi vi tion nepre ne sigelu;
prefere restos mi en la bezono.

ANTONIO Ne timu, mia kara; mi ne perdos.
Post malpli ol monatoj du (lasante
do plenmonaton ĝis la maturiĝo
de l' akto) mi atendas la revenon
de tri triobloj de l' nomita sumo.

SHYLOCK Ho, patro Abram, kiaj homoj estas
kristanoj tiuj! kies propraj agoj
severaj suspektigas ilin pri
la pensoj aliulaj. Se maltrafus
li sian tagon, diru vi, mi petas,
kion mi gajnus, insistante pri
la pago de l' nomita punkondiĉo?

Funto da homa karno, fortranĉite,
jam ne valoras, ŝate nek profite,
viandon ŝafan, bovan, aŭ de kaproj.
Mi, por aĉeti lian korinklinon,
konfese, tiun amikaĵon faras.
Se plaĉas, prenu li; se ne, adiaŭ!
kaj pro bonvolo mia, ne malicu.

ANTONIO Jes, Shylock, tian akton mi sigelos.

SHYLOCK Do tuj vizitu mian notarion;
mendu ĉe li gajeman tiun akton.
Mi iros nun dukatojn ensakigi,
domon prizorgos, nun sub gardo duba
de malzorgema knab' kaj sen prokrasto
vin trovos.

ANTONIO Iru do, hebre' aminda.

Eliras Shylock.

La judo kristaniĝos; li dolĉiĝas.

BASSANIO Parolon belan el kanajla buŝo
malfidas mi.

ANTONIO Ni iru. Ne en tio
konsterno povas esti. Miaj ŝipoj
revenos antaŭdate plenmonaton.

Ili eliras.

AKTO DUA

SCENO I.

En Belmont. Salono en la domo de Portia.

Trumpetado. Eniras la princo de Maroko kaj lia sekvantaro; Portia, Nerissa kaj aliaj akompanantoj.

MAROKO

Min ne malŝatu pro vizaĝkoloro,
ombra livreo de l' brilega suno,
najbaro mia kaj proksimparenco.
Al mi konduku viron plej palhaŭtan
el nordo, kie sub Febusa fajro
la pendglaci' apenaŭ degeliĝas;
por via amo ambaŭ ni nin tranĉu
prove, ĉu li aŭ mi pli ruĝe sangos.
Mi ĵuras, sinjorin', aspekto mia
timigis kuraĝulojn; mi certigas
per mia amo, ke en mia lando
ĝin amis plej ŝatataj virgulinoj.
Ne volus mi koloron mian ŝanĝi,
escepte se mi tiel povus ŝteli,
reĝino mia dolĉa, viajn pensojn.

PORTIA Por ŝataferoj min ne sola gvidas
knabina vidinklino la kaprica;
cetere min la loteri' destina
baras de rajto de elekto propra.
Se tamen mia patro ne limigus
kaj artifikus min, ke mi min cedu
edzinon ties, kiu min akiros
per jam dirita la rimedo, tiam
vi, eminenta princo, havus ŝancon
ne malpli bonan, por inklino mia,
ol ĉiu jam vidita alveninto.

MAROKO Pro tiu nura vorto mi vin dankas.
Mi petas, do, konduku al la kestoj
por provi mian sorton. Pro glavego
la jena, kiu Sofon pereigis
kaj persan princon kaj en tri bataloj
venkis sultanon Soliman', volonte,
por vin akiri, sinjorin', okulojn
venkrigardegus mi la plej kruelajn;
elspitus plej bravegan en la mondo
la koron; al ursino mi forŝirus
suĉantajn la idetojn; eĉ leonon
mi mokus, kiam ĝi malsate blekas.
Sed vante ĉio! Se la kubojn ĵetas
kun Liĥas Herkuleso, por decidi,
kiu el ili estas la bravulo,

la malpli forta mano, per fortuno,
 tre eble elpoentos la pli fortan;
 kaj la paĝio venkos Herkuleson.
 Simile mi, gvidata de fortuno
 la blinda, povas mem maltrafi, kie
 la malpli inda trafos kaj pereii
 per malĝojego.

PORTIA

Subiri vian sorton

vi devas. Aŭ ne provu la elekton,
 aŭ ĵuru, elektonte, ke neniam,
 okaze de maltrafo, poste vi
 proponos al virino, kiu ajn,
 vin kiel edzon; do pripensu bone.

MAROKO

Plenumos mi. Al mia sort' konduku.

PORTIA

Unue al la templo; post tagmanĝo
 vi provos la hazardon.

MAROKO

Estu tiam

bonŝanco! Mi el ĉiuj viroj estos
 la plej benata, aŭ plej malfeliĉa.

Trumpetado. Ĉiuj diras.

SCENO II.

En Venecio. Sur strato.

Eniras Launcelot.

LAUNCELOT Certe mia konscienco servos al mi por forkuri de tiu judo, mia mastro. La diablo ĉe mia kubuto tentas min, dirante: *Gobbo, aŭ Lanclot Gobbo, aŭ bona Lanclot, aŭ bona Gobbo, aŭ bona Lanclot Gobbo*, uzu viajn kruojn, ekiru, forkuru. Mia konscienco diras: *Ne! gardu vin, honesta Lanclot; gardu vin, honesta Gobbo*, aŭ, kiel dirite, *honesta Lanclot Gobbo; ne kuru; la kuraĉon malŝatu kaj piedbatu*. Nu, la tre kuraĝa diablo konsilas min forpaki: *For!* diras la diablo; *ekiru!* diras la diablo; *pro ĉielo*, diras la diablo, *veku bravan unimon kaj forkuru*. Nu, mia konscienco, ĉirkaŭbrakante la kolon de mia koro, min konsilas tre saĝe: *Amiko mia honesta, Lanclot, kiel filo de honesta viro*, aŭ pli ĝuste, filo de honesta virino; ĉar rilate mian patron oni iomete sentas, kvazaŭ iel flaras, aŭ gustumetas ion; do, mia konscienco diras: *Lanclot, ne, depaŝu. Depaŝu*, diras la diablo. *Ne depaŝu*, diras mia konscienco. *Konscienco*, mi diras, *vi bone konsilas; Diablo*, mi diras, *vi bone konsilas*. Por obei mian konsciencon, mi restus kun la judo mia

mastro, kiu, trafe dirate, estas speco de satano; sed, kurante for de la judo, mi obeus al la diablo, kiu, por ne tro krude paroli, estas Satano mem. Certe la judo estas vera satano en karno; kaj per mia konscienco, mia konscienco estas nur ia severa konscienco, volante konsili al mi, ke mi restu kun la judo. La diablo estas la pli amika konsilanto; mi kuros, diablo; miaj piedoj estas je via dispono; mi kuros.

Eniras Maljuna Gobbo, kun korbo.

GOBBO Mastro junulo, vi, mi petas vin, kiu vojo kondukas al la domo de sinjoro judo?

LAUNCELOT (*Flanken*) Ho, ĉielo! jen mia orde-naskita patro, kiu, estante pli-ol-sable blinda, eĉ ŝtonete blinda, ne rekonas min; mi provu lin per embarasoj.

GOBBO Mastro juna sinjoro, mi petas vin, kiu vojo kondukas al la domo de sinjoro judo?

LAUNCELOT Turnu vin dekstren ĉe la neksta angulo, sed tuj post-nekste, maldekstren turniĝu; atentu, tiam-nekste, neniekstren turniĝu, sed sendekliniĝe direktu vin al la domo de la judo.

GOBBO Per la sanktaj veraĵoj, estos tre malfacile tien trafi. Ĉu vi povas sciigi min, ĉu loĝas ĉe li certa Launcelot, kiu ĉe li loĝas?

- LAUNCELOT Ĉu vi parolas pri juna sinjoro Launcelot?
(*Flanken*) Jen edifo! nun mi instigos la akvon.
Ĉu vi parolas pri juna sinjoro Launcelot?
- GOBBO Ne pri sinjoro, sinjoro, sed pri filo de malriĉa homo. Lia patro, kvankam estas mi, kiu diras ĝin, estas honesta, tre malriĉa viro kaj dank'al Dio, en profunda aĝo.
- LAUNCELOT Nu, kia ajn estu lia patro, ni parolas pri juna sinjoro Launcelot.
- GOBBO Amiko de via moŝto kaj Launcelot, sinjoro.
- LAUNCELOT Sed mi petas vin, *ergo*, maljunulo, *ergo*, mi petegas vin, ĉu pri juna sinjoro Launcelot vi parolas?
- GOBBO Pri Launcelot, se plaĉas al via mastra moŝto.
- LAUNCELOT *Ergo*, sinjoro Launcelot. Ne parolu patro, pri sinjoro Launcelot; ĉar tiu juna sinjoro, laŭ la Fataloj kaj Destinoj kaj tiaj strangaj diroj, laŭ la Tri Fratinoj kaj tielaj kleraĵoj, efektive eksvivuliĝis, aŭ, por esprimi ĝin pli klare, li iris al la ĉielo.
- GOBBO Kompatu, Dio! La knabo estis vera bastono por mia maljuneco, vera trabo por apogo.
- LAUNCELOT Ĉu mi do aspektas kiel batilo, aŭ baraka fosto? Ĉu kiel stango aŭ tegmenta trabo? Ĉu vi konas min, patro?

- GOBBO** Aj-jo, aj-jo! mi ne konas vin, juna sinjoro; sed diru, mi petegas, ĉu mia knabo — Dio indulgu lin — ankoraŭ vivas, aŭ jam mortis?
- LAUNCELOT** Ĉu vi ne rekonas min, patreto?
- GOBBO** Ho, ve; sinjoro, mi estas duonblinda; mi vin ne konas.
- LAUNCELOT** Nu vere, se eĉ servus al vi la okuloj, vi eble ne bone rekonus min, ĉar: *Patro certa, viro lerta*. Nu, maljunulo, mi volas doni al vi novaĵon pri via filo; donu al mi vian benon; la vero nepre venos en la lumon; krimo ne longe restas kaŝita; tion eble povas filo, tamen la vero fine aperos.
- GOBBO** Mi petas, sinjoro, ke vi stariĝu. Mi estas certa, ke vi ne estas mia knabo Launcelot.
- LAUNCELOT** Ni ĉesu petoladi; mi petas, kaj vi donu al mi vian benon. Mi estas Launcelot, via knabo estinta, via filo estanta, via infano estonta.
- GOBBO** Mi ne povas kredi, ke vi estas mia filo.
- LAUNCELOT** Pri tio mi ne esprimas opinion; tamen mi estas Launcelot, servanto de la judo; kaj mi estas certa, ke Marĝeri, via edzino, estas mia patri-no.
- GOBBO** Efektive, ŝia nomo estas Marĝeri; kaj mi ĵuras, ke, se vi estas Launcelot, vi estas mia karno kaj sango. Anĝeloj kaj sanktuloj! Kian barbon vi

ricevis! Vi havas pli abundajn harojn sur via mentono, ol Dabin mia ĉarĉevalo portas sur sia vosto.

LAUNCELOT Ŝajne do la vosto de Dabin malkreskas; mi estas certa, ke li havis pli multe da haroj sur la vosto, ol mi havas sur la vizaĝo, kiam mi laste vidis lin.

GOBBO Diablo, sed kiom vi sangîĝis! Ĉu estas harmonio inter vi kaj via mastro? Mi alportis al li donacon. Ĉu inter vi ekzistas harmonio?

LAUNCELOT Sufiĉe bona; tamen miaflanke, ĉar mi *pozis* kiel kuronto, mi *ripozos* nur kiel kurinto. Vera judulo estas mia mastro. Ha, fari al tiu donacon! Donacu prefere pendoŝnuron. Mi en lia servado mortas de malsato; vi povas kalkuli per miaj ripoj ĉiujn miajn fingrojn. Patro, mi ĝojas, ke vi venis; donu al mi vian donacon por iu sinjoro Bassanio; tiu provizas bravajn novajn livreojn. Se mi ne servos al li, mi kuros ĝis la ekstrema limo de la bieno de Dio. Ho, ĝustatempa bonŝanco! jen li venas mem. Al li, patro; ĉar se mi ankoraŭ plu servos al la judo, mi estas judulo. *Eniras Bassanio, kun Leonardo kaj aliaj sekvantoj.*

BASSANIO Tion mi konsentas; tamen agu tiel rapide, ke la vespermanĝo estos preta almenaŭ je la kvina

horo. Zorgu pri la livero de tiuj ĉi leteroj; mendu definitive la livreojn; petu al Gratiano, ke li senprokraste venu al mia loĝejo.

Eliras unu servanto.

LAUNCELOT Aliru lin, patro.

GOBBO Dio benu vian Moŝton!

BASSANIO Dikompaton kun mi? Ĉu vi ion volas kun mi?

GOBBO Jen, sinjoro, mia filo, malriĉa knabo —

LAUNCELOT Ne malriĉa knabo, sinjoro, sed servisto de la riĉa judo; kiu volas, sinjoro, kiel klarigos mia patro, —

GOBBO Li havas grandan *deĵiron*, sinjoro, por tiel diri, por servi, —

LAUNCELOT Efektive, longe kaj mallonge dirite, mi estas servisto de la judo kaj mi deziras, kiel mia patro rimarkigos —

GOBBO Lia mastro kaj li, se via moŝto afable permesas, apenaŭ taŭgas kiel kunloĝantoj-

LAUNCELOT Per malmultaj vortoj, la vera vero estas tio: la judo, trudinte al mi malbonon, igas min, kiel mia patro, estante, mi esperas, maljunulo, disvolvos al vi, —

GOBBO Mi havas tie ĉi pladon da kolomboj, kiun mi deziras donaci al via moŝto kaj mia peto estas —

LAUNCELOT Tre mallonge, la peto *konsternas* min, kiel via moŝto sciiĝos per tiu ĉi honesta maljunulo; kaj, kvankam mi ĝin diras, kvankam maljunulo, tamen malriĉulo, mia patro.

BASSANIO Unu por ambaŭ parolu. Kion vi deziras?

LAUNCELOT Servi vin, sinjoro.

GOBBO Jen la vera *nesenco* de la parolo, sinjoro.

BASSANIO Mi konas vin; la peton mi konsentas. Hodiaŭ Shylock nomis vin al mi kaj vin favoris, se favor' ĝi estas, ke riĉa jud' maldungas vin, por servi mankhavan, kiel estas mi, nobelon.

LAUNCELOT La malnova proverbo estas tre egale dividita inter vi, sinjoro, kaj mia mastro Shylock: vi havas la Dian favoron kaj li la favan oron.

BASSANIO Tre lerta diro. Nun foriru ambaŭ. Vi la eksmastron adiaŭu, poste loĝejon mian serĉu. *(Al Leonardo)* Al li donu livreon ekstre ornamitan. Zorgu.

LAUNCELOT Patro, antaŭen. *(Ironie)* Mi do ne povas ricevi odeon, ho, ne! En mia kapo do ne estas lango! *(Rigardas sian manplaton)* Nu, se en Italujo troviĝas homo kun pli prospera manplato, li ĵuru pri tio super libro; mi nepre havos bonan sorton. Jen vi havas! jen simpla strio de l' vivo; jen bagatela areto da edzinoj: eĉ sen signifo estas

dekkvino da edzinoj! Dek unu vidvinoj kaj naŭ knabinoj, jen kio estas modera preno por unu viro; krom tio trifoje sin savi el drono kaj stari en danĝero de morto per tranĉo de pluma litkusenego; jen simplaj evitoj. Nu, se Fortuno estas virino, ŝi estas en tiu rilato bona knabino. Venu, patro; mi adiaŭos la judon en unu ekbrieto de okulo.

Eliras Launcelot kaj Maljuna Gobbo.

BASSANIO Pripensu tion, bona Leonardo, mi petas. La objektojn aĉetinte kaj orde dismetinte, sen prokrasto revenu vi, ĉar mi festenon faras hodiaŭ nokte por konatoj miaj la plej ŝatataj; iru kaj rapide.

LEONARDO Laŭ mia nura eblo mi plenumos.

Eniras Gratiano.

GRATIANO Kie la mastro via?

LEONARDO Jen, sinjoro,
promenas li.

Li eliras.

GRATIANO Sinjor' Bassanio!

BASSANIO Estas Gratiano!

GRATIANO Al vi mi havas peton.

BASSANIO Mi plenumos.

GRATIANO Vi ne rifuzu. Nepre vin al Belmont mi volas akompani.

BASSANIO Do vi devas.
Sed aŭdu, Gratiano: viaj moroj sovaĝaj iom estas kaj tro kruda kaj laŭta via voĉo. Kvankam decas al vi ĉi ĉio en okuloj niaj, kaj vin senkulpe ornamadas, tamen ĉe homoj ne konantaj vin, ĝi ŝajnas trolibereca. Penu, mi vin petas, per kelkaj gutoj da modesto frosta spiriton vian dancan kvietigi, por ke sovaĝa sintenado via ne faru min malkomprenata tie, kien mi iras, nek al mi perdigu esperojn miajn.

GRATIANO Aŭdu min, sinjoro Bassanio; se mi ne kondutos jene: min vesti per sobreco; kun respekto paroli; ne (aŭ tre malofte) ĵuri; en mia poŝo porti preĝlibretojn; aspekti milde; eĉ, dum oni diras la preĝon antaŭmanĝan, kaŝi tiel okulojn per ĉapelo kaj spirĝeme diri *amen!* ĉiurilate agi ceremonie, kvazaŭ instruito

en solenega festa rol' por plaĉi
sian avinon: se mi ne kondutos
tiele, vi neniam plu min fidu.

BASSANIO Nu, ni observos vian sintenadon.

GRATIANO Tamen konsentas mi ne por hodiaŭ.
Vi ne mezuru min laŭ la agado
de hodiaŭa nokto.

BASSANIO Kompreneble!

Prefere mi petegas vin, bravege
vin vesti per gajeco senmezura;
ĉar miaj gastoj venas kun intenco
pri gaja festo. Tamen nun adiaŭ!
Aferoj vokas min.

GRATIANO

Mi devas vidi
Lorenzon kaj ceterajn; tamen ni
vizitos vin je vespermanĝa horo.

Ili eliras.

SCENO III.

La sama. Ĉambro en la domo de Shylock.

Eniras Jessica kaj Launcelot.

JESSICA Bedaŭras mi, ke tiel vi la patron
 lasas. Infero estas nia domo;
 kaj vi, diablo gaja, forigadis
 de ĝi almenaŭ iom de l' enuo.
 Adiaŭ! jen dukat' por via poŝo;
 kaj, Launcelot, baldaŭ en la vespermanĝo
 ĉe via nova mastro, vidos vi
 Lorenzon, lian gaston; al li donu
 leteron tiun ĉi, sed tre sekrete.
 Kaj nun adiaŭ! Ne deziras mi,
 ke l' patro vidu min kun vi paroli.

LAUNCELOT Adiaŭ! La larmoj malhelpas al mi la langon.
 Belega paganino, plej dolĉa judino! Se vi ne de-
 venas de ia petolinta kristano, mi forte eraras.
 Tamen, adiaŭ! Tiuj ĉi malsaĝaj gutoj iom sufo-
 kas mian spiriton de viro. Adiaŭ!

JESSICA Adiaŭ, bonulo Launcelot!
Eliras Launcelot.
 Ve! peka malindeco, ke mi hontas
 de mia patro esti la infano!
 Sed, se laŭ sango mi filino estas,
 laŭ moroj tamen mi ne estas lia.

Lorenzo, se promeson vi plenumos,
mi finos la malpacon kaj fariĝos
edzin' amanta kaj kristana via.
Ŝi eliras.

SCENO IV.

La sama. Sur strato.

Eniras Gratiano, Lorenzo, Salarino kaj Salanio.

LORENZO Nu, forŝteliĝos ni dum vespermanĝo,
nin trompevestos en loĝejo mia,
kaj tuj revenos, horon forestinte.

GRATIANO Ne taŭge ni preparis.

SALARINO Eĉ ĝis nun
ni ne aranĝis pri la torĉportantoj.

SALANIO Nur abomene estos, se sen gusto
oni aranĝos ĝin; mi opinias
prefere, ĝin ne entrepreni tute.

LORENZO Nur estas nun la kvara. Ni disponas
du horojn por elfini la preparojn.

Eniras Launcelot, kun letero.

Amiko Launcelot, kio da novaĵo?

LAUNCELOT Se al vi plaĉos disŝiri ĉi tion,
verŝajne ĝi iom montros.

LORENZO Mi konas la manskribon; bela mano
ĝi estas; kaj pli pure blanka estas
la skriba mano, ol la skribpapero.

GRATIANO Hm! Amnovaĵo.

LAUNCELOT Permesu, sinjoro.

LORENZO Kien iras vi?

LAUNCELOT Ĝuste, sinjoro, por inviti mian malnovan mast-
ron, la judon, vespermanĝi hodiaŭ kun mia
nova mastro, la kristano.

LORENZO Haltu kaj prenu tion; diru vi
al Jessica, ke nepre mi plenumos.
Ĝin diru tre sekrete; iru nun.

Eliras Launcelot.

Sinjoroj, ĉu vi volas vin pretigi
por maskafero nokta hodiaŭa?
Pri la torĉisto mia, mi aranĝis.

SALARINO Volonte; mi klopodos sen prokrasto.

SALANIO Mi ankaŭ.

LORENZO En loĝej' de Gratiano
renkontu min kaj lin post unu horo.

SALARINO Ni ĝuste faros.

Eliras Salarino kaj Salanio.

GRATIANO Ŝajnas al mi, ke la letero venis
de bela Jessica?

LORENZO

Al vi mi devas

konfidi ĉion. Ŝi instruis min,
kiel mi kaptu ŝin de l' patra domo,
kiom da oro ŝi al si provizis
kaj da juveloj, ankaŭ kiajn vestojn,
fasonajn por paĝio, ŝi pretigis.
Se eble en ĉielon iam venos
la judo, ŝia patro, ĝin li ŝuldos
nur al filino ŝia, la aminda.
Kaj se maltimos iam malbonŝanco
piedon ŝian karan falimpliki,
nur povus esti tio sub preteksto
ĉar ŝi filino estas de malfida
la judo. Iru nun kun mi kaj legu,
irante, tion ĉi, ĉar Jessica
la bela estos torĉportisto mia.

Ili eliras.

SCENO V.

La sama. Antaŭ la domo de Shylock.

Eniras Shylock kaj Launcelot.

SHYLOCK Nu, vidos vi (atestos la okuloj)
inter maljuna Shylock kaj Bassanio
la diferencon. — Hola, Jessica! —
Vi ne manĝegos tie, kiel vi
ĉi tie faris. — Hola, Jessica! —
Vi ankaŭ ne pasigos vian tempon
dormante, ronkadante, trasirante
la vestojn; — Hola, Jessica, mi diras!

LAUNCELOT Ho, Jessica!

SHYLOCK Vin kiu petis krii?
Mi ne ordonas krii vin.

LAUNCELOT Via moŝto ĉiam diradis, ke mi nenion povas
fari neordonite.

Eniras Jessica.

JESSICA Ĉu vi vokas? Kion vi deziras?

SHYLOCK Mi estas invitita, Jessica,
por vespermanĝo. Jen ŝlosiloj miaj.
Laŭ kia devo, tamen, mi akceptas
faritan ne pro amo, sed por flato,
inviton? Sed mi iros en malamo,
por manĝi je la kosto de malŝpara
kristano. Jessica, filino mia,

vi gardu mian domon. Tre nevole
mi iras. Trankvilecon mian io
malbona jam minacas; ĉar en nokto
la lasta, mi pri monaj sakoj songis.

LAUNCELOT Iru, sinjoro, mi vin petegas; mia juna mastro
senpacience atencas vin.

SHYLOCK Kaj mi lin.

LAUNCELOT Se prosperis al ili la aranĝoj, mi ne diras al vi,
ke vi vidos maskaferon; sed, se tiel estos, tiam
ne sen signifo mia nazo eksangadis lastan Ni-
gran London je la sesa horo matene, okaze ke
en tiu jaro estis Merkredo cindra de la granda
fasto post kvar jaroj, posttagmeze.

SHYLOCK Ha, kion? Maskofesto? Jessica!
Aŭskultu: Miajn pordojn firme ŝlosu;
kaj se vi aŭdos la tamburon, kun
la fajfblekaĉo de l' koltorda fluto,
vi tiam ne ŝteliĝu al fenestroj,
nek kapon ŝovu en publikan straton
rigardi la vizaĝojn koloritajn
de klaŭnoj kristanaĉoj. Tuj vi ŝtopu
l' orelojn domajn, kompreneble miajn
fenestrojn, por ke danda petolado
ne sonu en sobrema mia domo.
Mi ĵuras per Jakoba la bastono,
la noktan festenadon hodiaŭan

neniel amas mi; mi tamen iros.

Vi, homo, antaŭiru por anonci.

LAUNCELOT Mi antaŭiros, sinjoro

(Flanken al Jessica) Tamen, mastrino, malgraŭ
ĉio, rigardu el fenestro:

Vi vidos kristanan belulon;

Li kostos judinan okulon.

Li eliras.

SHYLOCK La Hagarida bubo kion diras?

JESSICA Nenion pli ol *Sinjorin'*, *adiaŭ!*

SHYLOCK Honesta bubo, li, sed manĝegulo,
limake malrapida por profito;
li pli dormadas en la tago ol
sovaĝa kato. Mia abelujo
ne estas por abeloj nelaboraj;
do mi maldungas lin kaj lin mi sendas
al homo, kiun espereble li
helpos malŝpari la pruntitan monon.
Nu, Jessica, eniru; eble mi
revenos baldaŭ. Faru laŭ ordono;
fermu post vi la pordojn.

Kiu forte ligas,

Al ŝtelo ne instigas.

proverbo ĉiam fresa por ŝparulo.

Li eliras.

JESSICA Adiaŭ! Se fortuno rekte trafos,
mi perdis patron, vi filinon perdis.
Ŝi eliras.

SCENO VI.

La sama.

Eniras Gratiano kaj Salarino, maskitaj.

GRATIANO En tiu ĉi barako lin atendi
Lorenzo nin deziris.

SALARINO Li malfruas.

GRATIANO Mirinde, ke foreston li daŭrigas;
ĉar ĝenerale ĉe amantoj estas
konkurso kun horloĝo.

SALARINO Ordinare,
dekoble pli rapidas la kolomboj
Venusaj por sankcii novan ligon
de l' amo, ol por savi garantion
de fido jam metita.

GRATIANO Ĉiam sama
principo tenas. Kiu post festeno
leviĝas kun egala apetito
je tiu ĉe alsido? Ĉu ĉevalo
pasas revenan vojon, lacigite,
kun vervo de la elirado? Ĉion,

kio ekzistas, ni pli vigle ĉasas,
ol ĝin kaptinte ĝuas. Jen simila
al nespertulo aŭ malŝpara dando
elnaĝas el haveno sia hejma
flagornamita barko, kiun vento
la malmodesta preme ĉirkaŭbrakas,
dorlote karesante. Jen simila
al elspezinta dando ĝi revenas,
ripoj rompitaĵ, veloj ĉifonitaĵ,
malgrasa, difektita, trarabita
de l' vento malmodesta!

SALARINO

Jen, Lorenzo

venas. Ni poste tion plu parolu.

Eniras Lorenzo.

LORENZO

Amikoj karaj, petas mi indulgon
pro longa la foresto; ne mi mem,
sed la aferoj, atendigis vin.

Se iam plaĉos vin, ŝtelistojn roli
por la edzinoj, tiam rekompence
mi vin atendos. Venu; tie loĝas
bopatro la hebreo. Hola, tie!

Aperas Jessica, supre, knabe vestita.

JESSICA

Vi kiu estas? Pro certigo diru;
ĵureble tamen konas mi la voĉon.

LORENZO

Lorenzo, via koro.

JESSICA Lorenzo certe, mia koro vere,
ĉar vin plej amas mi. Nur vi, Lorenzo,
scipovas, ĉu mi estas via koro.

LORENZO Tia vi estas laŭ atest' duopa:
jen de l' ĉielo, jen de pensoj miaj.

JESSICA Nu, viglu, kaptu tiun ĉi kesteton;
valoras ĝi la penon. Mi kontentas,
ke pro mallumo min vi ne rigardas,
ĉar min hontigas tiu ĉi maskvesto.
Sed blinda estas amo kaj amantoj
ne vidas belajn siajn petoladojn;
alie, ekruĝiĝus mem Kupro,
min vidi tiel knabe prezentita.

LORENZO Malsupren venu, ĉar torĉisto mia
vi devas esti.

JESSICA Kiel? Ĉu mi devas
al miaj hontoj lumi? Ili mem
tro lumas jam; karulo mia, tio
malkaŝofico estas kaj mi devus
resti kaŝita.

LORENZO Jam kaŝita estas
vi, karulino, per la ĉarma ŝajno
de knabo. Tamen senprokraste venu,
ĉar kaŝa nokto iĝas forkurulo,
kaj ĉe l' festeno de Bassanio nin
oni atendas.

JESSICA Mi la pordojn ŝlosos,
kaj min riĉigos per ankoraŭ kelkaj
dukatoj kaj alestos senprokraste.

Ŝi eliras supre.

GRATIANO Nu, per honoro, genta kaj ne juda.

LORENZO Insultu, se mi ŝin ne kore amas.
Saĝa ŝi estas, se mi juĝkapablas;
kaj bela, se okuloj ne mensogas;
fidela, ĉar ŝi mem sin tia montris.
Do ĉiam regos tiu bildo saĝa,
bela, fidela, en animo mia!

Eniras Jessica.

Vi venis, do. Sinjoroj, nun antaŭen!
Jam nin atendas niaj kunmaskantoj.

Li eliras kun Jessica kaj Salarino.

Eniras Antonio.

ANTONIO Jen kiu estas?

GRATIANO Ha, sinjor' Antonio!

ANTONIO Tamen, Gratiano, kien sin fortiris
ĉiuj ceteraj? Jam la naŭa estas;
kaj oni vin atendas. Ne hodiaŭ
maskaĵo estos, ĉar favore blovas,
kaj tuj Bassanio surŝipiĝos. Dudek
mi sendis por elserĉi vin.

GRATIANO

Kontenta

mi estas; pli ol ĉion mi deziras
ĉinokte mem subvele forveturi.

Ili eliras.

SCENO VII.

En Belmont. Salono en la domo de Portia.

Trumpetado. Eniras Portia, kun la princo de Maroko kaj iliaj sekvantaroj.

PORTIA Iru kaj, detirinte la kurtenojn,
malkaŝu al nobela tiu princo
la tri kestetojn.

Nun vi faru la elekton.

MAROKO El oro la unua, kun la skribo:

Kiu elektos min, deziraĵon de multaj ricevos.

La dua, el arĝento, kun promeso:

Min elektante, ricevos vi laŭ via merito.

La tria, el malhela plumbo, portas
plumbe-obtuzajn vortojn de admono:

Donu ĉion, risku ĉion, min elektante.

Se mi elektos ĝuste, kia signo?

PORTIA Unu enhavas, princ', portreton mian.
Se tiun vi elektos, tiam mi,
kun ĝi, fariĝos via.

MAROKO

Ia min diaĵo

konsilu! Konsideru mi. Denove

relegos mi, laŭ ordo returnita.

Nu, kion diras la kesteto plumba?

Donu ĉion, risku ĉion, min elektante.

Mi devas doni! sed por kio? Plumbo!

Riski por plumbo? Minacanta kesto!

Se homo ĉion riskas, li, riskante,

almenaŭ celas gajnon belaspektan.

Animo ora ne rigardas ŝate

humilajn la metalojn. Mi ne ĉion

fordonos kaj hazardos, nur pro plumbo!

Kaj nun vi, arĝentaĵo kun koloro

virgeca, kion diras vi?

Min elektante, ricevos vi laŭ via merito.

Laŭ la merito! Paŭzu jam, Maroko;

meriton vian egalmane pesu.

Se taksi vin laŭ opinio propra,

sufiĉe vi meritas. Tamen eble

eĉ tia sufiĉeco ne atingos

la sinjorinon. Sed malfidi propran

meriton, tio estus trocedema

sinmaltaŭgigo. Kiom mi meritas!

La sinjorinon, kompreneble. Mi

laŭ nasko, laŭ fortuno, laŭ bontono

socia kaj eduka ŝin meritas,

sed multe pli laŭ amo. Ĉu ne bone sen plua paŭzo tuj decidi? Tamen relegu mi la skribon orĉizitan.

Kiu elektos min, deziraĵon de multaj ricevos.

La sinjorinon mem; ĉar ŝin deziras la tuta mond': el ĉiuj kvar anguloj de l' tero ili venas, por ĉi tiun sanktejon kisi de la sanktulino home-spiranta. La dezertaj lokoj Hirkanaj kaj la stepaj izolejoj de vasta Arabujo nun similas ĉefvojon por la princoj veturantaj ĉi tien por rigardi belan Portian. La regno akva, kies aroganta buŝeg' vizaĝon de l' ĉielo kraĉas, nur vane baras al spiritoj fremdaj: kvazaŭ trans rivereton ili venas ĉi tien por viziti belan Portian. En unu el la tri, portreto ŝia ĉiela kuŝas. Ĉu verŝajne plumbo entenas ŝin? Inferan tian penson infero rekompencus! Tro malindus la plumbo eĉ por gardi en mallumo la tombotukon de kadavro ŝia. Aŭ ĉu mi pensu, ke karcero ŝia estas arĝento, valoranta nur

dekone kontraŭ oro rafinita?
 Ho, peka penso! kadron pli malindan
 ol oro meti al juvelo tia!
 Neniel povas esti. En Anglujo
 ormono estas kun anĝela bildo
 stampita, — tamen sur la eksteraĵo;
 sed tie ĉi interne, anĝelino
 sur ora lito kuŝas. La ŝlosilon
 donu. Elektis mi; bonŝanco sekvu!
 Jen, prenu, princo; kaj se mia bildo
 troviĝas tie, jam mi estas via.

PORTIA

Li malŝlosas la oran kesteton.

MAROKO

Pro la infero! Kia jen objekto?
 Kranio de kadavro, kun papero
 en okulkavo sia! La skribaĵon
 mi legos.

(Li legas.)

*Ne ĉio brilanta el oro konsistas;
 Pri tiu ĉi fakto saĝuloj insistas.
 Jam multe da homoj meritis inferon
 Por povi rigardi nur mian eksteron.
 La vermoj troviĝas en tombo orita.
 Se vi estus egale kuraĝa kaj sprita:
 Junulo, sed saĝa, ne estus skribita
 Por vi la respondo: Adiaŭ al vi, ĝis
 Eterne. La svato por vi malvarmiĝis.*

Malvarmo efektive; kaj klopodoj
 perditaj; do adiaŭ, ĉio varma!
 Saluton al malvarmo! Venu frosto!
 Adiaŭ, Portia! Al mi tro doloras
 la koro, por permesi adiaŭon
 tedlongan. Malgajninto jen foriras.

Li eliras kun sia sekvantaro. Trumpetado.

PORTIA

Agrabla forpermeso! Nun kuntiru
 kurtenojn kaj foriru. Tiel ĉiuj
 samkoloruloj liaj min maltrafu.

Ili eliras.

SCENO VIII.

En Venecio. Sur strato.

Eniras Salarino kaj Salanio.

SALARINO

Mi vidis mem Bassanion, mia kara,
 forveli; kaj veturas Gratiano
 kun li; mi scias ankaŭ, ke Lorenzo
 ne estas en ilia ŝipo.

SALANIO

Tiu
 judaĉo per kriegoj ekinstigis
 la dukon; kaj ĉi tiu akompanis
 lin, por traserĉi la Basanjan ŝipon.

SALARINO Li venis tro malfrue, ekforvelis
la ŝipo; sed la duko tie aŭdis,
ke oni vidis en gondol' Lorenzon
kun sia Jessica amema. Ankaŭ
Antonio mem certigis al la duko,
ke ili ne kunŝipas kun Bassanio.

SALANIO Neniam mi pasion tian aŭdis,
tiel konfuzan, strangan, eksterliman,
sanĝiĝan, kiun tiu hundo judo
elŝutis sur la stratoj: *Ho, filino!*
Dukatoj miaj! Ho, filino mia!
Forkuris kun kristano! Ho, kristanaj
dukatoj miaj! Juĝon! La leĝaron!
Dukatoj miaj kaj filino mia!
Sak' sigelita, du sigelitaj sakoĵ da dukatoj.
duoblaj dukataĵoj. Min prirabis la filino!
Kaj la juveloj: ŝtonoj du, du ŝtonoj altvaloraj
kaj multekostaj, forŝtelitaj de filino mia!
Justeco! trovi la knabinon; ŝi la ŝtonojn havas,
ankoraŭ havas ŝtonojn multavalorajn kaj dukatojn.

SALARINO Lin sekvas la stratbuboj Veneciaj
kriante: *liaj ŝtonoj kaj filino kaj dukatoj.*

SALANIO Plej bone, ke Antonio akurate
observu sian tagon, aŭ tre certe
li pagos tion ĉi.

SALARINO

Ha! mi memoras:

Hieraŭ mi kun franco paroladis;
li diris, ke en la mallarĝa maro
inter Francujo kaj Angluj' pereis
riĉe ŝargita ŝipo nialanda.

Ĉe la rakonto, pensis mi pri nia
Antonio, kaj silente ekdeziris,
ke ĝi ne estu lia.

SALANIO

Estos bone

se vi rakontos ĉion al Antonio;
sed ne tro krude, ĉar ĝi povos vundi.

SALARINO

Sur tero ne pasadas pli bonkora
noblulo. Vidis mi la adiaŭon
inter Bassanio kaj Antonio. Tiu
diris al tiu ĉi, ke li revenos
rapide laŭ ebleco; li respondis:
*Ne faru tion; ne pro mi, Bassanio,
aferon tiun fuŝu, sed atendu
la plenan maturiĝon de la tempo.
Koncerne mian akton kun la judo:
en vian amoplenan menson tio
sin eĉ ne trudu; estu vi gajega,
kaj la plej ĉefajn pensojn vi direktu
al amindumo kaj amfestoj tiaj,
kiaj al vi konvenos tie dece.*
Kaj tiam kun okuloj larmoplenaj

deturnis li vizaĝon kaj palpinte
 post si, li kaptis kaj premegis manon
 Basanjan kun kortuŝo tre impresa.
 Tiel disiĝis ili.

SALANIO

Al mi ŝajnas,
 ke por li sola li la mondon amas.
 Ni serĉu lin vizite kaj per io
 amuza distru pezan la humoron
 al li kroĉitan.

SALARINO

Tion do ni faru.

Ili eliras.

SCENO IX.

En Belmont. Salono en la domo de Portia.

Eniras Nerissa kun servisto.

NERISSA

Rapidu: la kurtenon senprokraste
 detiru, ĉar la princo Aragona
 la ĵuron faris kaj al la elekto
 nun venas.

*Trumpetado. Eniras la princo Aragona, Portia
 kaj iliaj sekvantaroj.*

PORTIA

Rigardu vi, nobela princo; tie
 jam staras la kestetoj; se divenos
 vi tiun, kiu min enhavas, tuj

solene oni faros nin geedzoj.

Sed se maltrafe via moŝt' konjektos,
vi devas sen prokrasto forveturi.

ARAGONA Al tri kondiĉoj min la ĵuro ligis:
unue, al neniuj iam nomi,
kiun elektis mi el la kestetoj;
kaj due, se maltrafos mi la ĝustan
kesteton, tiam mi neniam poste
proponu al virino, kiu ajn,
min kiel edzon; laste, se eraros
mi en elekto mia, tuj mi devas
vin lasi kaj foriri senprokraste.

PORTIA Pri tiuj ĉi kondiĉoj ĵuras ĉiu
provonto pri la senvalora mi.

ARAGONA Kaj tiel mi avertis min. Fortuno
al mi donacu koresperon mian!
Oro! Arĝento! Kaj malinda plumbo!

Donu ĉion, risku ĉion, min elektante.

Se devas mi fordoni aŭ hazardi,
antaŭe devas vi pli belaspekti!

La ora kesto kion diras? Jen:

Kiu elektos min, deziraĵon de multaj ricevos.

De multaj deziraĵo! Tiu "multaj"
signifus eble nur la senprudentan
amason, elektantan per la ŝajno.
Ĝi ne plimulte lernas, ol trompebla

okulo instruadas; ne penetras
ĝis la interno, sed, hirund-simila
sur la ekstera muro nestas, rekte
kontraŭ vetera forto kaj danĝero.
Ne volas mi elekti deziraĵon
de multaj, ne volante egalpasi
kun homoj ordinaraj, nek kalkuli
min ano de barbaraj la amasoj.
Vin do mi petas, trezorej' arĝenta,
denove diru la devizon vian.

Min elektante, ricevos vi laŭ via merito.

Bone dirite; ĉar fortunon logi
kaj laŭtan nomon havi, kiu provos
sen signo de merito? Jam neniu
al si arogu eminentan lokon,
ne meritinte ĝin. Deziras mi,
ke altaj statoj, rangoj kaj oncoj
ne estu subaĉetaĵoj, sed honoroj
eksteraj estu rekta rekompenco
pro la internaj ecoj! Tiam multaj
ĉapeloj manportataj dece sidus
sur kapoj indaj! Multaj, kiuj donas
ordonojn, tiam devus obeadi!
El la nobela semo, kiel granda
rikoltrestaĵo tiam translokiĝus
en vilaĝanan garbon! En draŝita

pajlo kaj ventumaĵo, kiel ofte
 malkaŝus ni la honorindan grenon! —
 Sed mi revenu al elekto mia:

Min elektante, ricevos vi laŭ via merito.

Pretendos mi meriton. Por ĉi tiu
 donu ŝlosilon kaj mi sorton mian
 malŝlosos sen prokrasto tie ĉi.

Li malfermas la arĝentan kesteton.

PORTIA Tro longa paŭzo pro la trovitaĵo.

ARAGONA Objekto kia! jen portreto de
 miopa idioto prezentanta
 al mi skribaĵon! Ĝin mi legos. Kiom
 vi malsimilas Portian! Kiom ankaŭ
 esperojn miajn kaj meriton mian!

Min elektante, ricevos vi laŭ via merito!

Ĉu laŭ merito mia mi ricevas
 nur frenezulan kapon? Ĉu min decas
 premio tia? Ĉu ne pli mi indas?

PORTIA Ofendo kaj juĝado estas agoj
 apartaj kaj kontraŭaj.

ARAGONA

Hm! Jen kio?

Li legas.)

*Kesteton la fajro sepfoje elprovis;
 Sepfoje proviĝis la juĝ', kiu povis
 Neniam maltrafi, sed ĝuste divenas.
 Stranguloj kisadas la ombrojn, sed venas*

*Al ili nur ĝuo de ombro. Mi konas
Malsaĝajn, al kiuj arĝento nur donas
Rebrilon; kaj tia la kesto, egale.
Edzinon vi kian ajn prenu normale,
Per mi tamen estos vi ĉiam kaptita.
Foriru! Vi estas jam sago pafita.*

Ju pli mi restos tie ĉi, des pli
mi montros min malsaĝa. Unukapa
edziĝpetadi mi ĉi tien venis; —
dukapa malsaĝulo mi foriras.
Adiaŭ, ĉarmulino! Ĉagrenate,
observos mi la ĵuron, pacienci.

Eliras Aragono kaj lia sekvantaro.

PORTIA Tiel kandela flamo papilion
brullekis. Ho, prudentaj malsaĝuloj!
En sia elektado ili havas
la saĝon per saĝeco mem maltrafi.

NERISSA Do sankte vera estas la proverbo:
*Pendŝnuro kaj edzino
iras laŭ sorta difino.*

PORTIA Iru, Nerissa, tiru la kurtenon.

Eniras servisto.

SERVISTO Ĉu sinjorino?

PORTIA Jes; ĉu oni vokas?

SERVISTO Ĵus, sinjorino, ĉe la pordo, juna Veneciano devojaĝis; tiu antaŭanoncas, ke sinjoro lia nun alveturas; kaj la plej konvenajn salutojn li prezentas: rekomendon, parolojn tre afablajn kaj, plej grave, donacojn multvalorajn. Tiel indan ambasadoron en la amaferoj ankoraŭ mi ne vidis. Ne pli dolĉe aprila tago antaŭmontras karan someron, ol sinjoron sian tiu rajdanto.

PORTIA Volu halti; ĉar mi timas, ke tuj pretendos vi parenco, kiun per tiel festotaga parolado vi laŭdas. Nu, Nerissa, ni rapidu; sopiras mi pri tiu kuriero Kupida, la bontone konduanta.

NERISSA Am-dio! se vin plaĉas, estu ĝi Sinjor' Bassanio.

Ili eliras.

AKTO TRIA

SCENO I.

En Venecio. Sur strato.

Eniras Salanio kaj Salarino.

SALANIO Nu, kio da novaĵo sur Rialto?

SALARINO Ankoraŭ sen kontraŭdiro vivas tie la famo, ke Antonio havas ŝipon riĉe sargitan, kiu pereis sur la maro mallarĝa; mi pensas, ke oni nomas la lokon Goodwins; tre danĝera malprofundaĵo kaj pereiga, kie kuŝas entombigitaj la kadavroj de multaj altaj ŝipoj, por tiel diri, se mia raportintino la Famo estas verema honestulino.

SALANIO Mi volus rilate tiun aferon, ke ŝi estu la plej mensogema babilulino, kiu iam kraketis per zingibro, aŭ kredigis al siaj najbaroj, ke ŝi funebras la trian edzon. Sed estas vere, tute sen trodiraj glitiĝoj kaj laŭlarĝa irado sur la difinita ĉefvojo de parolado, ke la bonulo Antonio, la honestulo Antonio, — ho, se mi nur disponus terminon sufiĉe bonan por akompani lian nomon! —

- SALARINO** Tamen, pri la frazfina punkto.
- SALANIO** Ha, kion vi diras? Nu, la fino estas, ke li perdis unu ŝipon.
- SALARINO** Mi deziras, ke tio estu finfino de liaj perdoj.
- SALANIO** Mi ĝustatempe diru amen! por ke la diablo ne interkruciĝu kun mia preĝo; ĉar jen li venas en la similaĵo de judo.
- Eniras Shylock.*
- Kiel nun, Shylock! kiuj novaĵoj ĉe la komercistoj?
- SHYLOCK** Vi sciis, neniuj pli bone, neniuj pli certe ol vi, pri la forflugo de mia filino.
- SALARINO** Jes, efektive; miaflanke mi konis la tajloron, kiu faris la flugilojn, per kiuj ŝi forflugis.
- SALANIO** Kaj Shylock, siaflanke, sciis, ke la birdeto jam ricevis plumojn; kaj en tiaj okazoj, se ili forflugas de la nesto, oni ne kondamnas.
- SHYLOCK** Ŝi ja estas kondamnita pro tiu peko.
- SALARINO** Jes, efektive, se la diablo povas esti ŝia juĝisto.
- SHYLOCK** Ve, ke mia propra karno kaj sango ribelis!
- SALANIO** Fi, fi, la maljuna karnaĉo! Ĉu ĝi ribelas en tioma aĝo?
- SHYLOCK** Mi diras, ke mia filino estas mia karno kaj sango.
- SALARINO** Pli diferencas inter si via karno kaj ŝia ol eborno kaj eburo; pli viaj sangoj diferencas ol ruĝa

vino kaj rejna. Sed diru, ĉu vi aŭdis, ĉu Antonio suferis perdon sur la maro, aŭ eble ne?

SHYLOCK Jen por mi plua malprosperaĵo; bankrotulo, malŝparema dando, kiu preskaŭ timas montri la vizaĝon sur Rialto; almozulo, kiu iam vendis tiel aplombe sur la komercplacon: li zorgu pri sia kontrakto. Li kutimis nomi min procentegulo: li zorgu pri sia kontrakto. Li kutimis pruntedoni monon pro kristana komplezemo; li zorgu pri sia kontrakto.

SALARINO Tamen kompreneble, se li malplenumos, vi ne prenos lian karnon. Por kio utilas tio?

SHYLOCK Por logi fiŝojn. Se ĝi nutros nenion alian, ĝi nutros almenaŭ mian venĝon. Li honte min traktis, li maltrafigis al mi duonmilionon, ridis pri miaj malprofitoj, mokis miajn gajnojn, malesitimis mian nacion, perfidis miajn marĉandojn, malvarmigis miajn amikojn, incitis miajn malamikojn; — kaj pro kio? ĉar mi estas hebreo! Ĉu hebreo ne havas okulojn? Ĉu hebreo ne havas manojn, organojn, mezurojn, sentojn, inklinojn, pasiojn? Ĉu ne nutrata de samaj manĝaĵoj, vundata de samaj vundiloj, ema ekhavi samaj malsanoj, kuracata de samaj rimedoj, varmigata kaj frostigata de samaj vintro kaj somero, kiel estas kristano? Se vi pikas nin, ĉu ni

ne sangas? Se vi tiklas nin, ĉu ni ne ridas? Se vi venenas nin, ĉu ni ne mortas? Kaj se vi ofendas nin, ĉu al ni ne decas revenĝi? Se ni similas vin laŭ ceteraĵoj, ankaŭ laŭ tio ni vin similos. Se hebreo ofendas kristanon, kia estas ĉi ties humileco? Nu, venĝo. Se kristano ofendas hebreon, kia, laŭ kristana ekzemplo, devas esti ĉi ties toleremo? Venĝo, kompreneble. La malindecon, kiun vi al mi instruas, mi plenumos; kaj estos strange, se mi ne plibonigos la instruon.

Eniras servisto.

SERVISTO Sinjoroj, mia mastro Antonio estas en sia domo kaj deziras paroli kun vi ambaŭ.

SALARINO Ni jam serĉis lin tien kaj reen.

Eniras Tubal.

SALANIO Jen venas alia el la gento; tria egalulo ne estas trovebla, se la diablo mem ne fariĝos judo.

Eliras Salanio, Salarino kaj servisto.

SHYLOCK Kiel nun, Tubal? Kia novaĵo el Ĝenovo? Ĉu vi trovis mian filinon?

TUBAL Ofte mi venis, kie oni rakontis pri ŝi; tamen ŝin trovi mi ne povas.

SHYLOCK Nu, jen, jen, jen, jen vi havas! Malaperis diamanto, kiu kostis al mi dumil dukatojn en Frankfurto! La malbeno neniam ĝis nun venis sur nian nacion: ĝis nun mi ne sentis ĝin;

dumil dukatoj en tio kaj aliaj multe-, multekostaj juveloj. Mi deziras, ke mia filino estu kadavro ĉe mia piedo kaj la juveloj ĉe ŝia orelo! Ke ŝi estu kuŝanta sur portilo ĉe mia piedo kaj la dukatoj en ŝia ĉerko! Ĉu neniu novaĵo pri ili? Nu, tiel estas; kaj elspeziĝis en la serĉado, mi ne scias kiom. Ho, perdo sur perdon! Formalaperas la ŝtelinto kun tiom kaj tiom aldone por trovi la ŝtelinton; kaj neniu kontentigaĵo, neniu venĝo; ne: nek troviĝas ia fatalo, kiu ne eksidus sur miajn ŝultrojn; neniuj spirĝemoj, kiujn mi ne spirus; neniuj larmoj, kiujn mi ne verŝus.

- TUBAL** Jes, aliaj homoj ankaŭ renkontas malbonŝancon: Antonio, kiel mi aŭdis en Ĝenovo, —
- SHYLOCK** Hej, hej, kion? fatalo, fatalo?
- TUBAL** Pereis unu lia ŝipego, veturanta el Tripoliso.
- SHYLOCK** Dion mi dankas, mi dankas al Dio! Ĉu vero, ĉu nepre vero?
- TUBAL** Mi parolis kun kelkaj el la ŝipanoj, kiuj saviĝis el la pereco.
- SHYLOCK** Dankon, dankon, bona Tubal! Bonaj, bonaj novaĵoj! Ha, ha, ha! Kie? Ĉu en Ĝenovo?
- TUBAL** Via filino elspezis en Ĝenovo, laŭ la famo, en unu nokto okdek dukatojn.
- SHYLOCK** Vi ponardas min; neniam mi revidos mian oron; okdek dukatojn! okdekon da dukatoj!

TUBAL Vojaĝis kun mi kelkaj el la kreditoroj de Antonio al Venecio; ili ĵuras, ke vole-nevole li rompiĝos.

SHYLOCK Mi tre ĝojas pri tio; mi turmentos lin; mi suferigos lin; mi ĝojegas pri tio.

TUBAL Unu el ili montris al mi ringon, kiun li ricevis de via filino intersanĝe por simio.

SHYLOCK Fi, fi al ŝi! vi faras al mi torturon, Tubal; tio estis mia turkiso; ĝin donis al mi Lea, kiam mi estis fraŭlo; mi ne fordonus ĝin por tuta dezereto da simioj.

TUBAL Tamen Antonio estas nepre ruinigita.

SHYLOCK Jes, efektive, tre, tre vere. Iru, Tubal, dungu por mi advokaton; aranĝu kun li du semajnojn anticipe. Se li malplenumos, mi forprenos al li la koron; ĉar nur se li estos for de Venecio, mi povos gajradi laŭ mia volo. Iru, Tubal, iru kaj revidu min en la sinagogo; iru, bona Tubal; en la sinagogo, Tubal.

Ili eliras.

SCENO II.

En Belmont. Salono en la domo de Portia.

Eniras Bassanio, Portia, Gratiano, Nerissa kaj akompanantoj.

PORTIA

Mi petas vin, prokrastu iom; paŭzu
almenaŭ kelkajn tagojn ĝis hazardo;
ĉar, se malĝuste vi elektos, mi
seniĝos je kunesto via; tial
detenu vin, mi petas, kelkan tempon.
Io pensigas min — sed ne la amo —,
ke mi ne volas perdi vin; kaj certe
ne tiel konsiladas la malamo.
Sed, por ke vi pli bone min komprenu —
fraŭlino tamen langon ne posedas
krom penso, — mi volonte vin detenus
monaton tie ĉi aŭ du, ĝis sorton
pri mi vi provos. Mi ja povus montri
divenon ĝustan, tamen nur ĵurrompe;
kaj nepre mi ne rompos; tiel, eble
maltrafos vi kaj tiel al mi trudos
la pekan volon, esti perfidinta.
Riproĉas mi okulojn viajn, kiuj
per sorĉo dupecigis min; duono
propraĵo via estas kaj duono
la via — ne! mi volis diri "mia",

sed se miaĵo, via; do tutaĵo
 ankoraŭ via. Sed tempaĉoj nunaj
 rajtaĵojn baras kontraŭ posedantoj;
 propraĵo via, do, ne estas via!
 Kaj se okazos peko, tiam iru
 ne mi, sed la fortuno, en inferon.
 Tro longe mi babilis, sed mi volas
 la tempon plilongigi, eltiradi,
 kaj streĉi per prokrasto, por deteni
 vin de elekto via.

BASSANIO

Lasu min

elekti, ĉar en stato mia nuna
 nur vivas mi sur streĉa torturilo.

PORTIA

Torturo! Do konfesu vi, Bassanio,
 ke vi perfidon miksis kun la amo.

BASSANIO

Nenian krom malbela tiu speco:
 malfido pri efektivigo fina
 de mia amo. Kiam fajr' kaj neĝo
 kunvivos amikece, tiam ankaŭ
 pariĝos mia amo kun perfido.

PORTIA

Tamen el sur streĉilo vi parolas;
 kaj torturataj homoj ĉion diras.

BASSANIO

Promesu vivon, — veron mi konfesos.

PORTIA

Konfesu do kaj vivu.

BASSANIO

La konfeso

nur estas: *Mi konfesas, ke mi amas.*

Aminda torturad'! Ĉar min instruas
la torturisto mem pri savrespondoj.
Sed iru mi al sorto kaj kestetoj.

PORTIA

Komencu do! Mi estas enŝlosita
en unu el la tri; se vi min amas,
vi min eltrovos. Ĉiuj staru for,
Nerissa kaj ceteraj. Dum elekton
li konsideras, muzikadu; tiam,
perdinte, li finiĝos kiel cigno,
muzike distriĝante; kaj por dece
plenigi la komparon: miaj larmoj
liveros rivereton kaj la akvan
mortliton lian. Sed li eble gajnos!
Kaj kia tiam estas la muziko?
Muziko tiam estas trumpetado
ĉe riverenc-farado de fidelaj
regatoj antaŭ reĝo ĵus kronita.
ĝi estas kvazaŭ sonoj de tagiĝo
la dolĉe enŝtelantaj en orelon
fianĉan, por lin voki al edziĝo.
Nun iras li ne malpli bravmiena,
sed multe pli amata, ol la juna
Alkido, kiam li rekaptis virgan
tributon, kiun Trojo kriegante
al la marmonstro pagis. Mi prezentas
ofer-viktimon kaj la alestantoj —

virinojn la Dardanajn kun okuloj
larmlacaj, elvenintajn por rigardi
iradon de l' laboro. Herkuleso,
alpaŝu! Se vi vivos, same mi.
Mi, kiu nur rigardas la batalon,
pli tremas ol la batalanto, vi.

*Muziko, dum Bassanio meditas super la
kestetoj.*

KANTO

Diru, de kie devenas la amo?

Ĉu de la koro, ĉu de la cerbo?

Kiel naskita, kiel nutrita?

Respondu, respondu.

En la okuloj naskiĝas la amo,

Per rigardado nutriĝas; ho, gardu!

Amo mortigas en sia lulilo.

Ĉiuj sonoru funebre pro l' amo:

Bojm bojm beluna bojm belun'.

ĈIUJ

Bojm bojm beluna bojm.

BASSANIO

Tre povas esti, ke paradobjektoj
la plej malmulte da valoro havas.
Ornamo ĉiam trompas en la mondo.
En ĵur-proceso, pledo la plej putra
kaj abomena povas ŝajni bona,
se nur spicite per belsona voĉo.
Ĉe religio, malbenita dogmo
hereza, kiu ajn, ricevos eble

aprobos kaj biblian citapogon
el cerbo serioza, forkaŝanta
la malindecon sub ornamo bela.
Malvirto la plej evidenta prenas
virtsignon ian sur la eksteraĵo.
Troviĝas ofte malbravulo, koron
havanta malfidindan kiel sabla
ŝtuparo, sed li tamen portas barbon
taŭgan por Herkuleso aŭ por Marso
fruntsulka, dum interna serĉo montras
en lia korp' hepaton lakte blankan,
kaj nur aspekton prenas li heroan
por fari sin timinda! Konsideru
belecon, kiel oni ĝin aĉetas
laŭ ĝia pezo; tiel do montriĝas
miraklo de naturo; ĉar, portante
plimulte, oni estas pli malpeza.
Kaj same, la krispitaj, orkoloraj,
serpentaj bukloj, kiuj tiel gaje
flirtadas kun la vento sur la kapo
de fama belulino, estas ofte
senduba doto de alia kapo,
kies kranio nun en tombo kuŝas.
Ornamo tiel estas nur la bordo
alloga de plej danĝerplena maro;
ĝi estas skarpo bela vualanta

hindinon belan; aŭ, per unu vorto,
 ŝajnvera vesto de ruzemaj tempoj
 por kapti la plej saĝajn. Tial, vi
 belaĉa oro, vi nutraj' malmola
 de Midas, vin neniel prenos mi;
 nek vin, vi pala sklavo, interhome
 komuna; tamen, vi malgrasa plumbo;
 pliŝajne vi minacas ol promesas.
 Paleco via pli ol elokvento
 influas min. Ĉi tie mi elektas.
 Rezultu ĝojo!

PORTIA

(Flanken) Kiel la ceteraj
 pasioj nun distriĝas en aeron;
 dubemaj pensoj, malesper' maltima,
 teruro frostremanta kaj ĵaluzo
 la verdokula! Ho, vi amo, estu
 modera kaj ekstazon vian regu;
 la ĝojon bridu laŭ mezuro; pli avaru
 kun tiu ĉi troeco; benon vian
 tro forte sentas mi; ĝin malpliigu,
 ke mi ne supersatu.

BASSANIO

Kian trovon?

Li malfermas la plumban kesteton.

Jen similaĵo de l' belega Portia!
 Sed kiu disimila homo tiel
 kun preskaŭ krea povo verkis ĝin?

Ĉu la okuloj movas sin? aŭ ili
ricevas kvazaŭ movon simpatie
kun okulgloboj miaj? Spir' miela
la nefermitajn lipojn apartigas;
tre dece tiel dolĉa bar' disigas
amikojn tiel dolĉajn. Tie ĉi
per siaj haroj rolas araneon
pentristo kun la orfadena reto
plektita por impliki virajn korojn
pli firme, ol araneaĵo tenas
kaptitajn kulojn. Sed okulojn ŝiajn
kiel li havis vidon por desegni?
Ĉar, kiam li unuan pentris, tiu
kredeble povus sorĉi ambaŭ liajn,
kaj resti mem nepara. Sed rigardu:
per kiom mia laŭdo tiun ombron
ofendas per taksado ne sufiĉe
altŝata, sammezure jena ombro
postsekvas lame la objekton mem.
Jen la folio, kiu mian sorton
entenas kaj anoncas.

Li legas

*Vi, kiu ne juĝas laŭ nura aspekto.
Egale bonŝancas por trafo, elekto!
Ĉar bonan fortunon ricevis vi tian,
Kontenta vi estu, ne serĉu alian.*

*Se vere vin plaĉas ĉi tiu kondiĉo,
Kaj vi la bonŝancon kalkulas feliĉo,
Vin turnu al la sinjorino, ker-damo,
Kaj ŝin ekposedu per kiso de amo.*

Foli' ĝentila, vere! Sinjorino bela,
permesu; mi mandaton jenan portas
por doni kaj ricevi. Kiel unu
el du publikaj konkurantoj, kiu
sin opinias bone meritinta,
sed, ĉe aplaŭdo kaj ĉieaj krioj,
kun kapturigo staras, rigardante
en dubo, ĉu aŭdataj la laŭdkrioj
rilatas lin, aŭ ne, — tiele mi,
ĉi tie, ho, belega sinjorino,
en dubo staras, ĉu mi ĝuste vidas,
ĝis vi subskribos, jesos kaj sankcios.

PORTIA Vi vidas min, Bassanio Via Moŝto,
kia mi staras. Kvankam por mi mem
sopiri al treega plibonigo
modere mi dezirus, por vi tamen
mi volus esti dudekoble mi,
kaj tio eĉ trioble; pli belega
miloble; kaj pli riĉa — mirade.
Por nur ricevi altŝatadon vian,
mi volus havi sen mezur', amikojn,
virtojn, belecojn kaj bienojn. Tamen

plensumo mia estas nur tutaĵo
de io konsistanta el: — knabino
nesperta kaj ne klera kaj ne lerta;
feliĉa, ke ŝi estas ne troaĝa
por lerni; pli feliĉa, ke almenaŭ
natura ŝia sprito kapabligas
al ŝi lernadon; laste, plej feliĉa,
ke ŝi spiriton sian malsovaĝan
konfidas al la via por instruo,
kiel al reĝ', reganto kaj sinjoro.
Mi mem kaj la miaĵo nun fariĝis
vi kaj la via. Antaŭ nur momento
mi estis estro de ĉi tiu bela
domego, mastro de l' servistoj miaj,
reĝino de mi mem: kaj nun subite
la domo, la servistoj kaj mi mem
al vi, sinjoro mia, apartenas.
Mi ĉion donas kun ĉi tiu ringo;
kaj ĝin se iam vi forigos, perdos,
aŭ fordonacos, tio antaŭmontru
pereon finan de amsento via,
kaj min rajtigu por insulti vin.

BASSANIO Min, sinjorino, je la parolpovo
senigis vi. Nur sangopulso mia
respondon donas; kaj en mia korpo
konfuzo tia regas, kian montras

zumanta, ĝoja homamaso, kiun
 ĵus bele alparolis kara princo;
 kaj tiam ĉiuj ioj, kunfandite
 fariĝas vasto da nenio krom
 ĝojego senesprime esprimata.
 Sed kiam jena ringo jenan fingron
 forlasos, tiam min forlasos vivo;
 vi tiam povos kun certeco diri:
Bassanio nepre mortis!

NERISSA

Viaj Moŝtoj,

Nun estas nia vico, kiuj staris
 apude kaj esperojn niajn vidis
 fariĝi realaĵo, por gratuli:
 Sinjoro, ĝojon! Ĝojon, sinjorino!

GRATIANO

Moŝto Bassanio kaj Moŝtin' aminda,
 al vi deziras mi: Vi ĝojon havu
 laŭ via pensopov'; kaj tio certe
 neniel min senigos. Kaj mi petas,
 ke, kiam viaj Moŝtoj solenigos
 kontrakton la fidelan, tiam mem
 edziĝu ankaŭ mi.

BASSANIO

Nu, kompreneble,
 se nur vi povos trovi la edzinon.

GRATIANO

Mi dankas, Moŝto; ŝin vi jam provizis.
 Okuloj miaj viglas, kiel viaj.
 Vi la mastrinon vidis, mi rigardis

la domaninon; enamiĝis vi,
 kaj mi — por tempokupo — enamiĝis.
 Egale, Moŝto, ni meritis ambaŭ.
 Dependis via sorto de ĉi tiu
 kesteto kaj okaze ankaŭ mia;
 ĉar, post amindumado ŝvitiganta,
 kaj amĵurado ĝis palato mia
 sekiĝis tute, fine mi ricevis
 promeson — espereble plenumotan —
 de jena belulin', ke ŝi min amos,
 se nur akiros via sortoprovo
 mastrinon ŝian.

PORTIA Ĉu, Nerissa, vere?

NERISSA Jes, sinjorino, se vin plaĉas tio.

BASSANIO Ĉu vi honeste, Gratian', intencas?

GRATIANO Sinjor', honeste!

BASSANIO En festeno nia
 edziĝo via estos tre ŝatata.

GRATIANO Ni vetu kun ili pri la unua knabo per mil dukatoj.

NERISSA Kion? Kun garantiaĵo deponita?

GRATIANO Ne! ĉar en tiu okazo ni nepre malgajnus.
 Sed kiu tie venas? Ĉu Lorenzo
 kun sia paganino? Jen malnova
 amiko Venecia; ĉu Salanio?

Eniras Lorenzo, Jessica kaj Salanio.

BASSANIO Lorenzo kaj Salanio, bonvenintaj
vi estu, kiom povas bonvenigi
la ĉi-tiea nova mia stato.
Se tion, kara Portia, vi permesas,
amikojn bonvenigas mi, samlandajn.

PORTIA Tutkore, via Moŝto, ankaŭ mi.

LORENZO Mi dankas vian Moŝton. Miaflanke,
mi ne intencis tiun ĉi viziton;
survoje renkontinte je Salanio,
mi cedis al insista lia peto,
ke mi lin akompanu.

SALANIO Mi insistis, Moŝto,
ne sen motivo, ĉar sinjor' Antonio
al vi lin rekomendas.

Li donas al Bassanio leteron.

BASSANIO Antaŭ ĉio
diru, mi petas, kiel nune fartas
amiko mia bona.

SALANIO Ne malsana,
krom eble en spirito; nek li sanas,
krom eble en spirito; lian staton
letero tiu montros.

GRATIANO Vi, Nerissa,
la fremdulinon jenan bonvenigu;
prizorgu ŝin. Salanio, mi salutas
El Venecio kiuj do novaĵoj?

Ĉu sanas tiu estro-komercisto,
bonul' Antonio? Certe lin ĝojigos
sukceso nia. Estas ni Jasonoj;
ni la ŝafveston gajnis.

SALANIO

Volus mi,
ke vi gajnintoj estu de l' ŝafvesto
de li perdita.

PORTIA

Jena skribitaĵo
enhavas ion malagrablan, kiu
forigas de la vangoj de Bassanio
la ruĝon; eble mortis iu kara;
nenio monda, ekster tio, povus
influi tiel strange la humoron
de sintenulo. Pli kaj pli malbone!
Permesu min, Bassanio; mi fariĝis
duone vi kaj devas duonpreni
kun vi libere ĉion enhavatan
en la skribaĵo.

BASSANIO

Ĉarma mia Portia,
jen kelkaj el plej malagrablaj vortoj.
jam iam makulintaj skribfolioj!
En la unua tempo, sinjorino,
de miaj am-proponoj, mi libere
konfesis, ke riĉaĵo mia tuta
nur en la vejnoj fluas, ke mi estas
simple nobelo. Tiam mi parolis

la veron; tamen, sinjorino kara,
vi vidos, ke, taksante min je nulo,
eĉ tiel fanfaronis mi. Anstataŭ
certigi, ke nenion mi valoras,
mi devus tiam diri, ke mi estas
eĉ malpli ol nenio; ĉar mi vere
alkroĉis min al unu plejkarulo,
tiel amikon mian implikante
kun lia malamiko, — por havigi
al mi rimedojn. Jen komunikaĵo.
Papero ĝia kvazaŭ de l' amiko
la korpo estas; ĉiu ĝia vorto
sangoŝprucanta buŝsimila vundo.
Salanio, ĉu ĝi povas tiel esti?
Ĉu vere malsukcesis ĉiuj liaj
komerc-hazardoj? Eĉ ne unu trafis?
el Tripoliso, Meksikuj', Anglujo,
Lisboa, Berberujo kaj Hindujo?
Ĉu eĉ ne unu ŝipo sin forsavis
de l' rokoj, malamikaj por komerco?
Sinjoro, eĉ ne unu. Ekster tio,
se eĉ li havus nun kontantan monon,
la judo, kiel ŝajnas, ne akceptus
repagon. Mi neniam konis homon,
an homoforman beston, tiel akre
avidan por detruĝi homaranon.

SALANIO

Matene kaj vespere li la dukon
turmentas; li la staton mem admonas
pri rajtoperdo, se al li justecon
malhelpos regnaj homoj. Eble dudek
komercegistroj, eĉ la duko mem
kaj altranguloj la plej eminentaj
kun li elprovis rezonadon, tamen
ankoraŭ li persistas en malica
pretendo sia pri la juĝasigno,
pri la justeco kaj pri sia akto.

JESSICA Kun li loĝante, mi lin aŭdis ĵuri
al Tubal kaj al Ĉus, samlandaj homoj,
ke li avidas pli l' Antonian karnon
ol dudekoble la de li ŝuldatan
monsumon; kaj mi scias, Via Moŝto,
ke se la leĝo kaj aŭtoritato
lin ne malhelpos, tiam kompatinda
Antonio tre suferos.

PORTIA Ĉu ĝi estas
amiko via kara, la premato?

BASSANIO Por mi amiko la plej kara; viro
la plej bonkora; malplej lacigebla
spirito, ĉiam preta por komplezi;
viro montranta la antikvan Roman
honoron pli ol ĉiu nun spiranta
en Italujo.

PORTIA

Kian sumon ŝuldas
li al la judo?

BASSANIO

Jam por mi li ŝuldas
trimil dukatojn.

PORTIA

Ĉu ne pli ol tiom?
Do pagu sesmil kaj kontrakton lian
nuligu; eĉ la sesmil duobligu;
kaj tion triobligu jam, prefere
ol ke amiko tia unu haron
forperdu pro la kulpo de Bassanio.
Unue min en preĝodom' donacu
per nomo de edzino; tiam for!
al Venecio kaj amiko via;
ĉar vi neniam devas flanke kuŝi
de Portia kun animo maltrankvila.
Oron vi povas havi por repagi
la bagatelan ŝuldon dudek fojojn;
kaj ĝin paginte, tien ĉi konduku
amikon la fidelan. Intertempe
mi kaj Nerissa, mia domanino
vivos en stato de knabin-vidvinoj.
Sed nun klopodu ni! ĉar vi foriros
en la edziĝotago mem. Gastigu
amikojn viajn; estu gajmiena.
Ĉar kare estas vi pagita, kare
mi amos vin. Sed legu nun al mi

la komunikon de l' amiko via.

BASSANIO *(Legas)* Karulo Bassanio, malprosperis al mi ĉiuj miaj ŝipoj; miaj kreditoroj iĝas kruelaj; miaj rimedoj estas tre malvastigitaj; mia kontrakto kun la judo estas limpasinta; kaj ĉar, pagante ĝin, mi nepre ne povos vivi, do rilate ĉiujn ŝuldojn inter vi kaj mi ni estas kvitaj, se nur mi povos vidi vin ĉe mia morto. Tamen faru laŭ plezuro via: se via amo ne inklinigas vin veni, ankaŭ vin ne devigu mia letero.

PORTIA Amato, rapidigu la aferojn kaj ekvojaĝu.

BASSANIO Ĉar mi havas vian permeson forveturi, mi rapidos. Sed ĝis reveno mia, mi kulpigos neniun liton per ripozo, kiu sin intermetus inter vi kaj mi.
Ili eliras.

SCENO III.

En Venecio. Sur strato.

Eniras Shylock, Salarino, Antonio kaj karceristo.

SHYLOCK Vi, karceristo, gardu lin. Kompaton al mi ne predikadu. Tie staras la malsaĝulo, kiu pruntedonadis pro danko. Karceristo, lin prizorgu,

ANTONIO Tamen afable, Shylock, min aŭskultu.

SHYLOCK Mi nepre havos la kontraktan rajton; vi ne parolu kontraŭ mia rajto.

Mi metis ĵuron, havi mian rajton. Neofendite vi min nomis hundo: sed, ĉar mi estas hundo, gardu vin de miaj dentoj. Devas malrifuzi la duko mian peton pri justeco. Mi miras, vi malinda karceristo, ke vi, naive, tiel promeniĝas lin laŭ deziro lia.

ANTONIO Mi petegas, aŭskultu min.

SHYLOCK Mi volas havi rajton; aŭskulti mi ne volas; nepre rajton mi havos; do vi plu ne paroladu. Ne volas mi fariĝi lacokula

molkapa malsaĝulo kaj balanci
malseveriĝan kapon kaj spirĝemi
kaj cedi, pro Kristanaj petegantoj.
Ne sekvu; ne toleros mi parolon;
mi rajton nepre havos.

Li eliras.

SALARINO

Tio estas

hundaĉo la plej necedema, kiu
kun homoj iam loĝis.

ANTONIO

Lasu lin.

Mi jam ne sekvos lin kun vanaj petoj.
Mi scias bone, kial li atencas
al mi la vivon, ĉar mi ofte savis
el liaj persekutoj pro limpaso
multajn al mi plendintajn. Tial li
malamas min.

SALARINO

Sed certe tiun ĉi

proceson ne subtenos nia duko.

ANTONIO

Ne povas li malhelpi la kuradon
de l' leĝo, pro la kontentiga stato
ĉe ni en Venecio de l' fremduloj.
Se oni ĝin difektos, tio naskos
plendojn pri la justec' en lia regno;
ĉar, en ĉi tiu urbo, la komerco
kaj la profit' koncernas naciojn
el ĉiuj landoj. Tial iru ni.

Malĝojoj kaj malgajnoj lastatempaj
min tiel malgrasigis, ke apenaŭ
da karno unu funton mi disponos
por sangavida mia kreditoro
morgaŭe. Nu, antaŭen, karceristo.
Mi preĝas Dion, ke Bassanio venu
por vidi min elpagi lian ŝuldon;
tiam ne zorgas mi pri la cetero!

Ili eliras.

SCENO IV.

En Belmont. Ĉambro en la domo de Portia.

*Eniras Portia, Nerissa, Lorenzo, Jessica kaj
Balthasar.*

LORENZO Mi devas, sinjorino, ĝin paroli
eĉ en ĉeesto via, ke vi havas
pri l' amikeco noblan, veran senton;
kio plej forte montras sin en tio,
ke tiel vi elportas la foreston
de l' edzo la nobela. Se vi tamen
konscius, kian homon vi honoras,
al kia honorinda viro vi
la helpon sendas, mi certigas vin,
vi pli fierus pri bonfaro via,

ol kiom vin devigas la kutima
malavareco via.

PORTIA

Pri bonfaroj
ankoraŭ mi neniam pentis, ankaŭ
pri tiu ĉi ne pentos mi; ĉar, kiam
komune vivas kaj pasigas tempon
kunuloj kaj egale sur animo
la amikecan juĝon portas, nepre
laŭ ia grado ili recipokas
rilate trajtojn, morojn kaj spiriton;
jen kio inklinigas min supozi,
ke tiu ĉi Antonio, ĉar li estas
de mia edz' amiko plej intima,
similas ankaŭ nepre lian moŝton.
Se tiel estas, kiel tre malkare
la similulon de animo mia
mi elaĉetis for de lia stato
de mizerec' infera! Sed sufiĉe:
tro ŝajnas kvazaŭ min mi laŭdas mem.
Alian temon aŭdu nun. Lorenzo,
la mastrumadon de ĉi tiu domo
en manojn viajn komisias mi
ĝis mia edz' revenos. Miaflanke,
sekretan ĵuron spiris mi ĉielen,
ke mi en preĝa meditado vivos,
akompanate nur de tiu ĉi

Nerissa, ĝis reveno de Bassanio kaj Gratiano. En monaĥinejo staranta en du-mejla interspaco ni loĝos. Ne rifuzu, mi petegas, ĉi tiun taskon, kiun al vi trudas nun mia amo kaj bezono ia.

LORENZO Volonte, sinjorin', ordonojn viajn afablajn ĉiam obeados mi.

PORTIA Jam miaj homoj mian volon scias, kaj vin, kun Jessica, respektos kvazaŭ moŝton Bassanion kaj min mem. Adiaŭ ĝis la revido nia!

LORENZO Belaj pensoj kaj ĝojaj horoj akompanu vin!

JESSICA Ĉiel feliĉa estu via koro, fraŭlina moŝto.

PORTIA Pro la bondeziro mi dankas vin; volonte mi ĝin turnas reen sur vin. Adiaŭ, Jessica!

Eliras Jessica kaj Lorenzo.

Nu, Balthasar, ĉar mi vin trovis ĉiam fidel-honesta, tiel ankaŭ nun mi trovu. Tiun ĉi leteron prenu, kaj vi penadon plej virecan uzu Padoven rapidegi; enmanigu al mia kuzo mem, doktor' Bellario;

kaj vidu, ke la notojn kaj la vestojn,
kiujn al vi li donos, vi alportu
kun pensa rapidec' al la vadejo,
publika transirejo de l' rivero
al Venecia vojo kondukanta.
Per vortoj ne prokrastu, sed foriru.
Pli frue tien trafos mi, ol vi.

BALTHASAR Laŭ povo, sinjorino, mi rapidos.

Li eliras.

PORTIA Nerissa, viglu. Mi laboron havas,
por vi ankoraŭ nekonatan. Edzojn
niajn revidos ni neatendite.

NERISSA Ĉu ili vidos nin?

PORTIA Rigardos, jes,
Nerissa, sed en tiaj vestoj, kiuj
al ili supozigos, ke al ni
la manko mankas. Mi libere vetos,
ke el ni du, vestitaj laŭ la modo
de junaj viroj, mi la sintenadon
pli decan montros kaj ponardon mian
pli bravmiene portos. Mi parolos
per sangîganta knaba-vira voĉo
ŝalmeca; el paŝetoj du afektaj
paŝegon viran faros mi; malpacojn
junule fanfaronos; mi mensogos
strange pri iaj moŝtaj sinjorinoj

pri amo min petintaj: rifuzite,
malsanis ili, mortis, mi ne zorgis;
tiam mi pentos, malgraŭ ĉio volos
ke estus mi ne mortigint' ilia.
Mi dudek tiajn mensogetojn diros,
kaj ĵuros homoj, ke, almenaŭ jaron,
lernejon mi forlasis. En la cerbo
mi portas mil bubegajn petolaĵojn
de tiaj hometaĉoj: tiajn mi
praktikos.

NERISSA

Ĉu ni nin al viroj turnos?

PORTIA

En virojn ni nin sanĝos. Via frazo
duoblan sencon portas, ĉe malnobla
interpretanto. Sed ni iru: mi klarigos
la tutan planon en kaleŝo mia
nun atendanta nin ĉe la pordego
de l' parko; do rapidu; mem hodiaŭ
ni devas dudek mejlojn traveturi.

Ili eliras.

SCENO V.

*La sama. En ĝardeno.**Eniras Launcelot kaj Jessica.*

LAUNCELOT Jes, vere; ĉar rimarku, ke la malbonaĵoj de la patro estas punotaj sur la idoj; tial mi certigas al vi, ke mi timas pri vi. Ĉiam mi libere parolis al vi, tial nun mi montras al vi mian obstinion pri la afero; tial estu trankvila, ĉar vere mi obstinias, ke vi estas kondamnita. Ekzistas en ĝi nur unu espero, kiu povas helpi al vi; kaj tiu estas nur speco de bastarda espero.

JESSICA Kaj kiu estas tiu espero, mi petas?

LAUNCELOT Vi iom povas esperi, ke via patro ne naskigis vin: ke vi ne estas filino de judo.

JESSICA Efektive tio estus bastarda speco de espero; tiam la malbonaĵoj de mia patrino estus punotaj sur mi.

LAUNCELOT Vere tiam mi timas, ke vi estas kondamnita pro ambaŭ gepatroj viaj; tiel penante eviti Scilon, vian patron, mi trafas en Karibdon, vian patronon. Nu, vi ambaŭrilate perdiĝis.

JESSICA Mi estos savita pro mia edzo: li kristanigis min.

LAUNCELOT Vere des pli li estas kulpa; jam estis sufiĉe da ni kristanoj, jam estis kiom povis vivi, unu kaj alia. Tiu farado de kristanoj altigos la koston de

porkoj; se ni ĉiuj fariĝos porkomanĝuloj, baldaŭ mono ne havigos al ni tranĉaĵon da lardo sur la karboj.

Eniras Lorenzo.

JESSICA Mi rakontos, Launcelot, al mia edzo, kion vi diras; jen li venas.

LORENZO Baldaŭ mi ĵaluziĝos pri vi, Launcelot, se tiel vi enanguligados mian edzinon.

JESSICA Ne, vi ne devas zorgi pro ni, Lorenzo; Launcelot kaj mi disputas. Li krude certigas min, ke ne estas kompato por mi en ĉielo, ĉar mi estas filino de hebreo; kaj li diras, ke vi ne estas bona civitano, ĉar, konvertante hebreojn en kristanojn, vi altigas la koston de porkoviando.

LORENZO Prefere mi respondos tion al la civito, ol vi la ŝvelecon de la negrino. La maŭrino gravediĝis per vi, Launcelot.

LAUNCELOT Koncerne la *maŭrinon*, mi volas, ke oni sin *marinu*; se ŝi estas malbona morulo laŭ la *maŭra moralo*, tio ne estas por mi *mirilo*.

LORENZO Kiel ĉiu malsaĝulo povas karamboli per vortoj! Kredeble baldaŭ silento fariĝos la plej ŝatata parto de l' spriteco kaj la parolo fariĝos ŝatinda nur ĉe la papagoj. Iru vi, homo; ordonu al ili pretigi por tagmanĝo.

LAUNCELOT Jam farite, sinjoro; ĉiuj havas apetiton.

LORENZO Benaĉon! kiel vigle vi spritumas. Do ordonu al ili, ke ili preparu la tagmanĝon.

LAUNCELOT Ankaŭ jam farite, sinjoro; tamen kovri estas la bontona vorto.

LORENZO Ĉu vi do kovros, homo?

LAUNCELOT Ne mian kapon, sinjoro: servisto ne rajtas porti ĉapelon.

LORENZO Ankoraŭ ĉikano laŭokaza! Ĉu vi volas ekspluati en unu momento vian tutan saĝohavon? Mi petas vin kompreni simplan homon laŭ lia simpla intenco. Iru do al la viuloj; ordonu al ili kovri la tablon, metu la manĝaĵojn kaj ni iros al tagmanĝo.

LAUNCELOT Koncerne la tablon, sinjoro, oni ĝin metos; koncerne la manĝaĵojn, sinjoro, oni ilin kovros; koncerne vian iron al tagmanĝo, sinjoro, nu, tio estu laŭ la regado de humoroj kaj konsideroj.

Li eliras.

LORENZO Ho, diskretemo! Kiel liaj vortoj fi-taŭgas. Tiu malsaĝulo fiksas en sia cerb' armeon da trafvortoj. Mi konas multajn bubojn, pli altstatajn sed kun provizo sama, kiuj spitas l' aferon mem pro ludo per esprimo. Vi kiel fartas, Jessica? Kaj nun

ĉu trovas vi ŝatinda la edzinon
de lia moŝt' Bassanio?

JESSICA

Mankas vortoj
por ĝin esprimi. Al Bassanio moŝta
tre decos, ke li vivu plej konvene;
ĉar, tiel feliĉega per edzino,
ĉielan ĝojon trovas li ĉi tie
sur tero; tion se li ne meritos
ĉi tie, kompreneble tre nedecos,
ke li en la ĉielon iam venu.
Nu, se en la ĉielo vete ludus
du dioj kaj garantiaĵon metus
en formo de teranaĵ du virinoj,
se Portia estus unu, oni devus
kun la alia meti ion ekstran
kompense; ĉar la krud-mizera mondo
egalulinon ŝian ne posedas.

LORENZO

En mi vi havas ĝuste tian edzon,
kia edzino ŝi.

JESSICA

Vi min demandu
pri opinio mia.

LORENZO

Jes, pli poste.
Nun ni tagmanĝon iru.

JESSICA

Ne; pli bone,
ke mi kun apetito laŭdu vin.

LORENZO Ne, ne! mi petas, estu ĝi ĉe-tabla
parolo; tiam, diru kion ajn,
mi kun la ceteraĵoj ĝin digestos.

JESSICA Nu, orde mi parados vin.

Ili eliras.

AKTO KVARA

SCENO I.

En Venecio. En tribunalo.

*Eniras la duko, la altranguloj, Antonio.
Bassanio, Gratiano, Salanio kaj aliaj.*

DUKO Nu, ĉu Antonio tie ĉi alestas?

ANTONIO Preta, se plaĉas al la Duka moŝto.

DUKO Mi vin domaĝas; venis vi responde al kontraŭul' ŝtoneca, hom' malhoma, kompaton ne konanta, tutmalplena je ĉiu ero da kompata sento.

ANTONIO Sciiĝis mi, ke via Duka moŝto multe klopodis moderigi lian troseverecon; sed, ĉar li ankoraŭ malcedas kaj rimed' neniu povas laŭleĝe min forporti ekster trafon malican lian, do mi kontraŭmetas al lia furiozo paciencon. Armita per spirita trankvileco, mi lian tiranecan koleregon toleros.

DUKO

Oni iru kaj la judon
en tribunalon voku.

SALANIO

Ĉe la pordo
li staras, via moŝto; jen li venas.

Eniras Shylock.

DUKO

Enlasu lin; li staru tie meze.
Shylock, la ĝeneralan opinion
mi partoprenas, ke vi nur kondukas
ĝis hor' ekstrema vian ŝajnmalicon;
kaj tiam, oni diras, vi elmontros
kompaton kaj bedaŭron pli frapantajn
ol via stranga kvazaŭ-krueleco;
kaj, kvankam nun pri perdo vi insistas,
nome pri unu funto de la karno
de tiu kompatinda komercisto,
vi tiam malpretendos la punperdon,
kaj plue, pro humana mildameco,
al li forlasos parton de l' ĉefsumo,
komplete rigardante liajn perdojn
tiel amasiĝintajn lastatempe
sur liajn ŝultrojn, ke sufiĉus ili
por ruinigi estron-komerciston
kaj eldevigi decan kondolencon
el brustoj kupraj, krud-silikaj koroj
kaj malcedemaj turkoj kaj tataroj
ne kutimintaj je afablaj faroj

kaj komplezemo. Ni atendas ĉiuj
el vi, hebreo, do, respondon dolĉan.

SHYLOCK

Moŝto, mi pri intenco mia jam
sciigis vin kaj per sabato nia
mi sankte ĵuris, ke de mia akto
postulos mi la decan punasignon.
Se vi rifuzos, tiam ve al via
civito kaj al ĝia libereco!
Vi min demandos, kial mi prefere
ricevos ian pezon da karnaĉo,
ol tridek centojn da dukatoj. Tion
mi ne respondos rekte. Sed supozu,
ke mi kapricon havas: ĉu sufiĉas?
Supozu, ke turmentas mian domon
rato kaj mi kontente pagos dekmil
dukatojn, por ĝin venenigi? Ĉu
respondon nun vi trovas? Kelkajn homojn
malplaĉas oscedanta porko; kelkaj
frenezas, se ekvidas ili katon;
aliaj, kiam sakfajfilo kantas
per naza tono, perdas sinregadon.
Tiel kaprico klinas la pasion,
kiel virino laŭ prefero sia,
al aĵo malŝatata aŭ ŝatata.
Kaj nun al la respondo: Kiel mankas
firma motivo, kial tiuj homoj

malamas jen la porkon oscedantan,
jen la kvietan, hejman katon, jen
la sakfajfilon felan, sed deviĝe,
vole-ne-vole cedas kaj hontante
ofendas, tamen ofendite mem:
tiel, klarigi la motivon mian
nek povas mi, nek volas; nur mi sentas
malamon firman, ian abomenon
kontraŭ Antonio, tial mi procesas
monperde kontraŭ li. Ĉu vi ricevis
respondon vian?

BASSANIO Vi senhonta homo!
Respondo tia ne pravigas vian
konduton kruelegan.

SHYLOCK Mi al vi
ne ŝuldas kontentigon per respondoj.

BASSANIO Ĉu ĉiu pereigas neamatan
objekton?

SHYLOCK Sed objekton malamatan
ĉu iu ne deziras pereigi?

BASSANIO Ne ĉiu ofendaĵo tuje naskas
malamon.

SHYLOCK Ĉu vi lasus al serpento
la duan fojon mordi vin?

ANTONIO

Mi petas,

vi konsideru, ke vi argumentas
kun tiu judo. Vi egale povus
sur la marbordo stari kaj ordoni
al Oceano iom deniveli
de sia alt' kutima; vi egale
povus demandi lupon, kial li
blekigis la ŝafinon pro ŝafido;
egale malpermesus vi al pinoj
montaraj siajn altajn suprojn svingi
kaj brui, ekskuate de la ventoj
ĉielaj; taskon la plej malfacilan
vi samprospere povus entrepreni,
kiel moligi tiun plej malmolan
el ĉiuj aĵoj — lian judan koron.
Mi do petegas, plu ne proponadu;
rimedojn plu ne uzu, sed, rapide
laŭ konveneco, mi ricevu juĝon
kaj cedu la postulon de la judo.

BASSANIO

Pro viaj trimil, jen dukatoj sesmil.

SHYLOCK

Se el dukatoj sesmil ĉiu unu
ses erojn havus, ĉiun po dukato,
mi ne akceptus: mi laŭ mia akto
postulus.

DUKO

Kiel vi esperos pri kompatato
mem, kiu ne kompatas?

SHYLOCK

Kian juĝon

mi timos, kiu ne malbonon faras?
Ĉe vi, la multajn aĉetitajn sklavojn
vi uzas, same kiel la azenojn,
hundojn kaj mulojn viajn, por oficoj
sklave humilaj, per aĉeta rajto.
Se mi parolos tiel: ili estu
*liberaj: kun gefiloj viaj ilin
edzigu. Kial ŝarĝojn ili portas
ŝvitante? Ili havu molajn litojn
egale kiel vi kaj manĝu same
bongustajn pecojn* — certe vi respondos:
La sklavoj estas niaj. Tiel ankaŭ
respondas mi. Tre kare mi aĉetis
karnfunton tiun, do ĝi estas mia,
kaj mi ĝin havos. Se vi min malhelpos,
fi al leĝaro via! Ne ekzistas
potenco en dekretoj Veneciaj.
Mi staras postulante la verdikton
de l' tribunalo. Ĉu mi ĝin ricevos?

MIKOLAJO
Mi povas per aŭtoritato mia
disigi la kunsidon, se ne venos
hodiaŭ tien ĉi doktoro klera
Bellario, kiun petis mi decidi
ĉi tion, sendis ankaŭ lin venigi.

MIKOLAJO

SALANIO Ekstere, via moŝto, tie staras
sendito de l' doktoro, kun leteroj.
Ĵus el Padov' li venis.

DUKO La leterojn
ĉi tien donu; voku la senditon.

BASSANIO Karul' Antonio, vin kuraĝe tenu!
La judo min ricevos, karnon, sangon,
ostojn kaj ĉion, antaŭ ol vi perdos
por mi eĉ unu sangoguton vian.

ANTONIO Mi estas infektulo en ŝafaro,
plej taŭga morti. Frukto plej malforta
plej frue falas teren; tiel estu
ankaŭ ĉe mi. Bassanio, vi ne povos
pli bone vin okupi, ol ankoraŭ
vivi kaj verki mian epitafon.

*Eniras Nerissa, vestita kiel skribisto de
advokato*

DUKO Ĉu el Padov' vi venis, de Bellario?

NERISSA Sinjoro, jes pri ambaŭ. Vian moŝton
Bellario jen salutas.

Prezentante leteron.

BASSANIO *(Al Shylock)* Kial vi
tranĉilon tiel verve pliakrigas?

SHYLOCK Por tranĉi mian juĝasignon for
de jena bankrotulo.

GRATIANO

Ho, kruela judaĉo! Por vi mem vi pliakrigas ne *feron*, sed *inferon*. Ne ekzistas metalo, eĉ hakilo la mortpuna, akra duone je malico via.

Ĉu vin neniu peto povas piki?

SHYLOCK

Konforma al saĝeco via? Ne!

GRATIANO

Ho, estu kondamnita, vi hundaĉo neelpetebla! Kaj pri via vivo justeco estu kulpigita. Preskaŭ pro vi mi dubas mian sanktan fidon, por opinii kun Pitagoras', ke bestanimoj translokigas sin en homajn korpojn. Via hundanimo regadis lupon, kiu, pendigite pro hommortigo, forflugigis sian animon tuj de l' pendigilo mem; kaj tiu ĉi enverŝis sin en vin ankoraŭ en malsankta patrinaĉo; deziroj viaj tial estas lupaj, sangamaj, malsategaj, rabakiraj.

SHYLOCK

Ĝis povos vi sigelon forinsulti de mia dokumento, vi ofendas nur viajn pulmojn per la kriegado.

Riparu, bona fraŭlo, vian spriton,
aŭ kadukiĝos ĝi neripareble.

Verdikton tribunalan mi atendas.

DUKO La skribo de Bellario rekomendas
al tiu ĉi juĝejo iun kleran
doktoron junan; kie do li estas?

NERISSA Apude li atendas, por ekkoni
respondon vian, ĉu vi lin enlasas.

DUKO Jes, tre plezure. Tri aŭ kvar el vi
konduku lin ĉi tien, tre afable.
Kaj dume la leteron de Bellario
la juĝantaro aŭdos.

SKRIBISTO *(Legas)* Via Moŝto devas kompreni, ke ricevante vian leteron mi tre malsanas; tamen en la momento, kiam via sendito alvenis, estis en afabla vizito ĉe mi juna doktoro el Romo; lia nomo estas Balthasar. Mi rakontis al li la cirkonstancojn de la proceso inter la hebreo kaj la komercisto Antonio; kune ni trafoliis multajn librojn; li estas provizita de mia opinio; kaj tio, freŝigita de lia propra klereco (kies profundecon mi ne sufiĉe povas admirigi), akompanas lin, laŭ mia insista petado, por plenumi, anstataŭ mi mem, la deziron esprimitan de via Moŝto. Mi petegas vin, lasu, ke lia manko de maljuneco ne malhelpu lin, havigante al li mankon de via respekto: ĉar neniam mi

konis tiel junan korpon kun tiel maljuna kapo. Mi lasas lin al via afabla akcepto, kies provo plej bone famigos lian aprobigon.

DUKO Do tiel skribas la klerul' Bellario;
kaj jen, kredeble, venas la doktoro.

Eniras Portia, vestita kiel doktoro de juro.

Mi premu vian manon. Ĉu vi venas ek de Bellario la maljuna?

PORTIA Jes,
mi venis, via moŝto.

DUKO Tre bonvene.
Okupu vian lokon. Ĉu vi konas la cirkonstancojn de l' koncerno, kiun ĉi tie ni esploras?

PORTIA La koncernon mi funde konas; oni volu montri al mi la komerciston kaj l' hebreon.

DUKO Antonio kaj maljuna Shylock, ambaŭ elpaŝu.

PORTIA Ĉu vi estas Shylock, nome?

SHYLOCK Mi estas Shylock, nome.

PORTIA La proceso, kiun vi faras, estas io stranga, bonorda tamen, tiel ke leĝaro la Venecia ne malhelpi povas procedan manieron vian. Vi:

(Al Antonio)

Ĉu vi ne staras en celkampo lia?

ANTONIO Almenaŭ li pretendas.

PORTIA Kaj la akton

ĉu vi konfesas?

ANTONIO Jes.

PORTIA Do la hebreo

kompato devas montri.

SHYLOCK Diru, vi,

per kia devigeo do mi *devas*?

PORTIA Kompato estas virto nedeviga;
ĝi gutas pluve, dolĉe, el ĉielo
sur suban lokon. Per duobla beno
ĝi benas: ĉe donado, ĉe ricevo.
Ĝi plej potencas kun la potenculo;
ĝi pli ol krono reĝon ornamadas.
La reĝa sceptro mondan povon montras,
simbolas respekteton, majestecon,
sidejon de la timosent' al reĝoj;
sed la kompato sidas super sceptroj;
ĝi tronas en la koro mem de reĝoj;
ĝi estas eco de la Plejpotenca;
kaj monda povo plej similas Dian,
se kompatemo spicas la justecon.
Do vi, hebreo, kvankam vi postulas
justaĵon leĝan, konsideru bone,

ke, laŭ justeco, Dian senkulpigon
neniu el ni trafus. Ĉu ne ĉiuj
ni preĝas por kompato? Tiaj preĝoj
kompaton devus al ni mem instrui.
Mi por dolĉigi vian pledon justan
parolis tiel longe; tamen, se
pri juĝo vi insistas, tiam nepre
la Venecia tribunalo devos
verdikton doni kontraŭ l' komercisto.

SHYLOCK Sur mian kapon miaj faroj! Nur
postulas mi la leĝon kaj verdikton
kaj pagon de l' rajtajo laŭ la akto.

PORTIA Ĉu eble li la monon povas pagi?

BASSANIO Jes; jen mi ĝin proponas en juĝejo;
eĉ la duoblon; se ĝi ne sufiĉas,
mi garantias ĝin dekoble pagi,
riskante miajn manojn, kapon, koron.
Se tio ne sufiĉas, evidente
malico premas veron. Mi petegas:
la leĝon per aŭtoritato via
por unu fojo streĉu iomete;
por ega bon', malbonon etan faru,
kaj maltrafigu tiun ĉi satanon.

PORTIA Ne eble; tie ĉi en Venecio
aŭtoritat' ne estas, kiu povus
nuligi pledon bone starigitan.

Ĝin povus citi ĉiuj por ekzemplo,
kaj laŭ modelo tiu sama, rampus
malbonoj multaj en la staton. Ne!
Ne povas esti tio.

SHYLOCK

Danielo

en juĝon venis! vera Danielo!
Saĝa juĝisto juna, kiom mi
respektas vin!

PORTIA

Permesu nun rigardi

la dokumenton.

SHYLOCK

Jen, respektigata

doktoro, jen ĝi estas.

PORTIA

Shylock, sumon

trioblan oni jen al vi proponas.

SHYLOCK

Ĵuron mi havas en ĉielo, ĵuron!

Per la perfido ĉu animon mian
makuli? Ne pro tuta Venecio!

PORTIA

Nu, tiu akto estas limpasinta;
do leĝe la hebreo per ĝi povas
postuli karnofunton kaj fortranĉi
de l' komercisto, apud lia koro.
Kompatu; la trioblon vi akceptu;
la dokumenton lasu min disŝiri.

SHYLOCK

Nur kiam ĝi solviĝos laŭ kondiĉoj.
Vi evidente estas honorinda
juĝisto; vi la juron funde konas;

kaj vi klarigon tre solidan faris.
Mi vin admonas per la leĝo, kies
kolon' vi estas bonmerita, pasu
al la verdikto; per animo mia
mi ĵuras, ke neniu homa lango
potencas min deklini. Mi sur mian
akton apogas min.

ANTONIO

Pri la verdikto

la juĝantaron kore mi petegas.

PORTIA

Do la decido estas: ke pretigu
vi bruston vian por tranĉilo lia, —

SHYLOCK

Nobla juĝisto! Ho, junul' bonega!

PORTIA

— ĉar la motivo kaj intenc' de l' leĝo
plene rilatas ankaŭ la punperdon
ĉi tie kondiĉitan sur la akto.

SHYLOCK

Tre vere. Ho, juĝist' lojale saĝa!
Kiom pli aĝa, ol vi nur aspektas!

PORTIA

Nudigu do la bruston.

SHYLOCK

Jes, la bruston;

juĝisto nobla, ĉu ne tiel diras
la akto? *Apud lia koro*, jen
la vortoj mem.

PORTIA

Jes. Ĉu vi havas preta

pesilon por la karnon ĝuste pesi?

SHYLOCK

Jam preta ĝin mi havas.

PORTIA

Shylock, lasu

alesti viakoste kuraciston
por flegi liajn vundojn, por ne lasi
ke sangu li ĝis morto.

SHYLOCK

Ĉu la akto

kondiĉon tian montras?

PORTIA

Ne per vortoj.

Sed, tamen! Pro homamo estus bone,
ke vi almenaŭ faru ĝin.

SHYLOCK

La akto

ne diras ĝin; mi ĝin ne trovas tie.

PORTIA

Vi, komercisto, ĉu vi ion diros?

ANTONIO

Nur tre malmulte: estas mi fortika
anime kaj tutpreta. Vian manon,
Bassanio, donu. Fine nun adiaŭ!
Ne malĝojegu, ke por vi mi venis
en tiun ekstremaĵon; ĉar en tio
sin montras la Fortuno pli kompleza
ol ordinare, ĉar kutime ŝi
la mizerulon lasas supervivi
riĉecon sian; tiel li kun frunto
sulkita kaj okuloj enfalintaj
malriĉan maljunecon sian vidas.
Sed min de tiu pentofaro daŭra
de mizereco ŝi fortranĉas nun.
Al moŝta la edzino via portu

saluton mian kaj al ŝi rakontu
laŭ kia manier' Antonio mortis.
Rakontu, kiel mi vin amis; min
mortintan laŭdu kiom decas; poste
ŝin petu juĝi, ĉu Bassanio iam
ne estis amegata. Se amikon
perdotan nur domaĝas vi, neniel
domaĝas li elpagi vian ŝuldon,
ĉar, se la judo nur profunde tranĉos,
mi baldaŭ pagos ĝin per tuta koro.

BASSANIO Antonio, mi edzinon havas, kiun
mi amas kiel mian propran vivon;
sed vivon mem, edzinon, tutan mondon
mi ne preferas antaŭ via vivo.
Mi ĉion volus perdi, eĉ oferi
nun al satano tiu, por vin savi.

PORTIA Ne multe dankus vin edzino via,
se ŝi, aleste, aŭdus la proponon.

GRATIANO Edzinon havas mi kaj, pro honoro,
mi amas ŝin. Mi volus, ke ŝi estu
en la ĉielo, se ŝi tiel povus
influi ŝanĝon al la hunda judo.

NERISSA Saĝe dirite, kie ŝi ne aŭdas,
ĉar la propono farus el la hejmo
maltrankvilejon.

SHYLOCK *(Flanken)* Tiaspecaj estas kristanaj edzoj. Mi filinon havas; mi prenis ian idon de Barabbas por sia edzo, antaŭ ol Kristanon! *(Laŭte)* Ni perdas tempon; volu la verdikton efektiviĝi.

PORTIA Funto de la karno de tiu komercisto estas via; la tribunal' asignas kaj la leĝo sankcias tion.

SHYLOCK Ho, juĝisto justa!

PORTIA Vi devas tranĉi ĝin de lia brusto; la leĝ' sankcias kaj la tribunalo asignas tion.

SHYLOCK Ho, juĝisto klera!

Verdikton deciditan! Nu, pretiĝu!

PORTIA Sed iom paŭzu; restas unu punkto.

La jena akto ne rajtigas vin pri eĉ sango unu, ĉar ĝi diras: *funton da karno*, jen la vortoj mem.

Viaĵon prenu do, la karnofunton; sed se, tranĉante ĝin, elverŝos vi guteton unu da kristana sango, bienoj viaj kaj havaĵoj ĉiuj laŭ Veneciaj leĝoj tuj perdiĝos konfiske al la Venecia ŝtato.

GRATIANO Juĝisto justa! Notu bone. Judo
Ho, la juĝisto klera!

SHYLOCK Ĉu la leĝo
tiele diras?

PORTIA La dekreton mem
vi vidis. Ĉar justaĵon vi postulas,
certiĝu, ke justaĵon vi ricevos
eĉ pli ol vi deziras.

GRATIANO Notu, judo:
Juĝisto klera! Ho, juĝisto klera!

SHYLOCK Do mi akceptas la proponon: pagu
trione la ĉefsumon; la kristano
estos libera.

BASSANIO Jen la mono estas.

PORTIA Tenu! ne rapidu.
Justecon oni faru al la judo:
krom la asigno li nenion havos.

GRATIANO Ho, judo! justa, klera la juĝisto!

PORTIA Pretiĝu do la karnon tranĉi for.
Neniun sangon verŝu; nek plimulte
nek malpli tranĉu, sed nur ĝustan funton.
Se pli aŭ malpli ol la ĝustan funton
vi tranĉos, eĉ per tiom, ke ĝi pezos
manke aŭ troe per la tut' aŭ parto
de dudekono da skrupul' mizera,
aŭ eĉ se deflankiĝos la pesilo

laŭtakse per dikeco unuhara,
vi mortos kaj la viaj konfiskiĝos.

GRATIANO Ha, judo! venis dua Danielo!
Nun, malkredulo, mi vin koksen premas.

PORTIA Kial la judo paŭzas? Prenu vi
asignon vian.

SHYLOCK La ĉefsumon donu,
kaj lasu min foriri.

BASSANIO Jen ĝi estas, preta.

PORTIA Ĝin li rifuzis jam en tribunalo.
Li havos nur justaĵon laŭ la akto.

GRATIANO Jen dua Danielo, mi ripetas!
Al vi mi dankas tiun vorton, judo.

SHYLOCK Eĉ la ĉefsumon ĉu mi ne ricevos?

PORTIA Ricevos vi nur vian asignaĵon
prenotan tiel viariske, judo.

SHYLOCK Nu benu ĝin Satan' al li. Ne plu
mi restos diskutante.

PORTIA Haltu, judo.
Ankoraŭ kroĉas sin al vi la leĝo.
En Veneciaj leĝoj dekretiĝis:
Se estas kontraŭ fremda hom' pruvite,
ke per penadoj rektaj aŭ malrektaj
atencas li de iu civitano
la vivon, tiam atencato tiu
de lia havo kaptu la duonon;

kaj la duon' alia enkasiĝu
ĉe l' ŝtato; kaj la vivon de l' krimulo
disponas nur la duko, absolute.
Situacion tiun vi okupas;
ĉar, evidente por la alestantoj,
malrekte, ankaŭ rekte, vi atencis
la vivon de la procesato; tiel
danĝeron ĵus nomitan vi enkuris.
indulgon dukan petu do genue.

GRATIANO Petegu pri permeso vin pendigi.
Sed tamen, ĉar la stato vian havon
konfiskis, eĉ la mono por pendŝnuro
al vi ne restas; tial je la kosto
de l' regno oni devos vin pendigi.

DUKO Por ke vi vidu, kiel diferencas
spiritoj niaj, mi pardonas vin
rilate vian vivon, nepetite.
Pri via havo: al Antonio unu
duono apartenas, la alian
la stato prenas, tamen humileco
ĝin povas sanĝi en monpunon simplan.

PORTIA Tio rilatas staton, ne Antonion.

SHYLOCK Ne, sed la vivon ankaŭ prenu; tion
vi ne indulgu; vi forigas domon,
se vi forigas ĝian subtenilon;

se mian vivrimedon vi forprenas,
vi prenas ankaŭ same mian vivon.

PORTIA Por li indulgon kian vi disponas,
Antonio?

GRATIANO Nur, pro Dio, pendoŝnuron
sen pago.

ANTONIO Se al via Duka moŝto
kaj tuta juĝantaro plaĉas, mi
kontente malpretendos la duonon
de lia haveco, se l' alian parton
ĝis lia morto li permesos min
uzi kaj tiam poste ĝin transdoni
al la sinjoro, kiu lastatempe
filinon lian ŝtelis; sed kun pluaj
kondiĉoj du: ke pro favoro tiu
li sen prokrasto kristaniĝu; due:
li tie ĉi donacan akton faru
por testamenti ĉion al Lorenzo
bofilo sia kaj al la filino.

DUKO Li tion faru, aŭ mi nun retiros
la ĵus faritan tie ĉi pardonon.

PORTIA Vi, judo, ĉu konsentas? kion diras?

SHYLOCK Konsentas mi.

PORTIA Skribisto, vi redaktu
donacan akton.

SHYLOCK

Mi petegas vin,
permesu min foriri; mi min sentas
nebone. Poste sendu tiun akton,
kaj mi subskribos.

DUKO

Iru, sed subskribu.

GRATIANO

Ĉe bapto, havos vi du baptopatrojn;
se estus mi juĝisto, pluan dekon
vi havus, por konduki al pendo,
kaj ne al baptopelvo.

Eliras Shylock.

DUKO

Vin, sinjoro,
mi petas al tagmanĝo en la domo.

PORTIA

De via moŝto mi humile petas
indulgon, ĉar hodiaŭ nokte mem
Padoven devas mi direkti min;
plej bone do ekiri sen prokrasto.

DUKO

Mi tre bedaŭras vian nedisponon.
Antonio, la sinjoron rekompencu,
ĉar ŝajnas, ke al li vi multe ŝuldas.

Eliras la duko kaj lia sekvantaro.

BASSANIO

Indega nobelulo, mi kaj mia
amiko, per saĝeco via, estas
hodiaŭ forsavitaj el severaj
suferoj; do pro viaj komplezemaj
penadoj, ni volonte la dukatojn

trimil, ŝulditajn al la judo, petas ke vi akceptu rekompence.

ANTONIO Plue,
por ĉiam restos ni ŝuldantoj viaj
por amo kaj sindono.

PORTIA Kiu estas
kontentigita, estas malavare
pagita; kaj, estante kontentega,
ke mi vin savis, mi egale sentas
min bone jam pagita, sed eĉ tiel
neniam mi pli profitama estis.
Rekonu min ĉe nova renkontiĝo;
tre kore mi salutas kaj adiaŭ!

BASSANIO Sinjoro kara, mi vin nepre tentu
akcepti pro memoro, ne pagilon,
sed amateston nian. Mi duoblan
komplezon petas: ke vi ne rifuzu,
kaj, due, ke afable vi pardonu.

PORTIA Ĉar liri vi insistas, mi kunsentos.

(Al Antonio)

La gantojn donu viajn kaj pro vi
mi ilin uzos;

(Al Bassanio) kaj pro korinklino
ĉi tiun vian ringon mi akceptos.

La manon ne detiru; tion sole
mi prenos; ĝin pro amo ne rifuzu.

- BASSANIO** Ĉi tiu ringo, kia bagatelo!
sinjoro, eĉ mi hontus ĝin donaci.
- PORTIA** Nenion mi akceptos krom ĉi tio;
kaj nur al ĝi mi sentas deziregon.
- BASSANIO** De ĝi dependas pli ol simpla kosto.
Donacos mi la plej-altprezan ringon
en Veneci', serĉinte ĝin proklame;
nur pri ĉi tiu volu min indulgi.
- PORTIA** Rimarkas mi, sinjoro, ke rilate
proponojn viajn, vi tre malavaras.
Vi orde min instruis, jen almozi,
jen almozulon dece respondadi.
- BASSANIO** Sinjoro bona, tiun ringon donis
al mi edzino mia; ĝin metante
ŝi min ĵurigis, ke mi ĝin ne vendos,
perdos, nek fordonacos.
- PORTIA** Jen preteksto
al multaj viroj bone jam servinta
por ŝpari la donacojn. La edzino,
se ne frenezas ŝi kaj se ŝi scios,
ke tiel bone mi meritis ĝin,
ne ĉiam pro la ringo malpacadus,
se vi ĝin donus. Nu, en pacon iru!
Eliras Portia kaj Nerissa.
- ANTONIO** Moŝto Bassanio, lasu ke li prenu
la ringon kaj meritoj liaj pezu

kun mia amo kontraŭ la admono
de la edzino.

BASSANIO

Sekvu, Gratiano,
ĝiskuru lin, al li la ringon donu,
kaj se vi povos, domen ĉe Antonio
konduku lin, rapidu, iru for!

Eliras Gratiano.

Ni sen prokrasto tien iru; morgaŭ
en frumateno ambaŭ ni rapidos
al Belmont. Venu nun, Antonio mia.

Ili eliras.

SCENO II.

La sama. Sur strato.

Eniras Portia kaj Nerissa.

PORTIA

Elserĉu vi la judan domon, donu
al li kaj subskribigu jenan akton.
Ĉi-nokte ni ekiros kaj alvenos
antaŭ la edzoj hejmen. Por Lorenzo
la akto estos io tre agrabla.

Eniras Gratiano.

GRATIANO

Sinjur' afabla, bone ĝisvenite!
Moŝto Bassanio, rekonsiliĝinte,

ĉi tiun ringon sendis, petegante,
ke vi kun li tagmanĝu.

PORTIA

Sed neeble.

Tre danke mi akceptas lian ringon;
volu rakonti tion, ankaŭ volu
al knabo mia montri la loĝejon
de la maljuna Shylock.

GRATIANO

Tre volonte.

NERISSA

(Al Portia)

Parolon volas mi kun vi, sinjoro.

(Duonvoĉe)

Atencos mi la edzan ringon, kiun
por ĉiam gardi mi ĵurigis lin.

PORTIA

(Duonvoĉe)

Prosperu ĝi; kaj nin regalos ili
ĵurante, ke la ringojn ili donis
al viroj; sed per blufo kaj ĵurado
ni venkos ilin. *(Laŭte)* For! rapide iru.
La rendevuon konas vi.

NERISSA

Sinjoro,

bonvolu min konduki al la domo.

Ili eliras.

AKTO KVINA

SCENO I.

En Edmont. En arb-aleo antaŭ la domo de Portia.

Eniras Lorenzo kaj Jessica.

LORENZO Brilegas tiu lun'. En tia nokto,
dum vento dolĉa kiskaresis arbojn
senbrue plezurantajn, tianokte
Troilus, mi supozas, supren rampis
sur Trojaj muroj kaj animon sian
spiregis al la grekaj tendoj, kie
Kresida kaŝis.

JESSICA En simila nokto
timege Tisbe roson superpaŝis,
kaj, antaŭ ombron de leon' vidinte,
konsterne kuris for.

LORENZO En tia nokto
Dido salikon svingis sur sovaĝa
marbordo, por reblovi al Kartago
amaton sian.

JESSICA

En simila nokto
Medeo ŝiris la sorĉitajn herbojn
por Eson maljunulo, kiuj poste
rejunuligis lin.

LORENZO

En tia nokto
for de la riĉa judo, Jessica
ŝteliĝis kaj el Venecio kuris
ĝis Belmont kun amanto malŝparema.

JESSICA

En tia nokto la junul' Lorenzo
ĵuris, ke li amegas ŝin kaj tiel
al ŝi forŝtelis la animon, multe
pri fideleco sankte promesante,
sed nur perfide.

LORENZO

Kaj en tia nokto
beleta Jessica, la insultema,
amanton sian kalumniis, tamen
li ŝin pardonis.

JESSICA

Mi vin elkonkurus
dum noktoj, se neniu venus: jen
paŝadon viran aŭdas mi; aŭskultu.
Eniras Stephano.

LORENZO

En la silento nokta kiu venas
kun tia rapideco?

STEPHANO

Nu, amiko.

LORENZO

Amiko kia? Diru vian nomon,
amiko, vi.

STEPHANO

Stephano, mia nomo.

Raportas mi, ke sinjorino mia
alestos antaŭ la tagiĝ' en Belmont.
Ŝi vagas apud sanktaj krucoj, tie
pregante pri feliĉa edzineco.

LORENZO

Kaj kiu kun ŝi venas?

STEPHANO

Sole iu

ermito sankta kaj la domanino.
Mi petas, ĉu la mastro jam revenis?

LORENZO

Ankoraŭ ne, nek li leteron sendis.
Sed ili eniru, Jessica, akceptan
ceremonion ian ni aranĝu
al la mastrino de l' domego.

Eniras Launcelot.

LAUNCELOT

Hola, hola! ŭo, ha, ho! hola, hola!

LORENZO

Kiu vokas?

LAUNCELOT

Hola! ĉu vi vidis mastron Lorenzon? Mastro
Lorenzo, hola, hola!

LORENZO

Ĉesigu vian hola-hola, homo: jen mi estas.

LAUNCELOT

Hola! kie? kie?

LORENZO

Ĉi tie.

LAUNCELOT

Diru al li, ke venis ekspreso de mia mastro,
kun korno plena da bonaj sciigoj; mia mastro
alvenos antaŭ la mateno.

Li eliras.

LORENZO Animo kara, ni eniru, tie
atendi la alvenon; tamen, kial
eniri? En la domo vi anoncu,
Stephano, ke alvenas la mastrino;
kaj plenaere metu muzikadon.

Eliras Stephano.

Jen dormas la lunlumo sur deklivo;
ĉi tie sidu ni kaj lasu vagi
muzikajn sonojn en oreloj niaj.
Konformas bone dolĉa trankvileco
de l' nokto je la karesemaj tuŝoj
de l' harmoni'. Sidiĝu, Jessica.
Rigardu, kiel la ĉiela planko
per oraj diskoj dense priŝutiĝis.
El tiuj briletantaj globoj ĉiu,
eĉ plej malgranda, en orbito sia
anĝele kantas en ĉiela ĥoro
kun la keruboj junokulaj; tiel
animoj la senmortaj harmonias.
Sed nin ĉi tiu kota kaj putrema
mondana korpo vestas kaj enŝlosas,
do ni ne povas aŭdi tiajn sonojn.

Eniras muzikistoj.

Vi venu kaj per himno la diinon
Dianan veku; per plej dolĉaj pulsoj

penetru la orelon de l' mastrino,
kaj per muziko hejmen ŝin tiradu.

Muziko.

JESSICA Neniam min gajigas muzikado.

LORENZO La kaŭzo estas via atentemo.

Observu nur bestaron malkviete
sovaĝan, aŭ anaron nedresitan
da junaj ĉevalidoj, kiel ili
freneze saltas, muĝas, aŭ blekegas
laŭ la varmega sangostato sia:
se eble ili aŭdas trumpetsonon,
aŭ se al ili frazo de muziko
atingas la orelojn, tuj vi vidos:
komune ili haltas, kun okuloj
post sovaĝeco nun kviete lumaj
per dolĉa la influo de l' muziko.
Pro tio la poeto nin kredigis,
ke Orfeo tiris arbojn, ŝtonojn, akvojn;
ĉar aĵo la plej bloka kaj malmola,
eĉ furioza, por la fojo prenas
malsaman econ sub muzikinfluo.
La homo sen muziko en si mem,
obtuzi kontraŭ dolĉaj son-akordoj,
konformas al perfidoj kaj intrigoj
kaj rabakiroj; la spiritaj movoj
al li obtuzaj estas kiel nokto,

kaj nigraj kiel Erebus' la sentoj.
Fidata li neniel estu. Tamen
aŭskultu la muzikon.

Eniras Portia kaj Nerissa.

PORTIA Jena lumo
en mia halo brulas. Kiel ĵetas
radiojn malproksimen kandeletu,
tiel, en mondo la malnobla, lumas
faraĵo nobla.

NERISSA Tamen, kiam brilis
la luno, ni ne vidis la kandelon.

PORTIA Tiel pli granda gloro nebuligas
la malpli grandan. Vicreĝeco brilas
egale kun reĝeco, ĝis alestos
la reĝo mem kaj tiam ĝia pompo
forfluas, kvazaŭ riveret' enlanda
en maran vaston. Aŭdu! jen muziko!

NERISSA La dom-muziko via, sinjorino.

PORTIA Nur relative, mi komprenas, ĉio
bonecon havas. Ĝi pli dolĉe sonas
al mi, ol en taglumo.

NERISSA La silento
donacas tiun econ, sinjorino.

PORTIA Egale bone korvo kaj alaŭdo
neaŭskultataj kantas; kaj mi kredas,
ke, se taglume kantis najtingalo

dum kvakas ĉie anserinoj, oni
ĝin ŝatus ne pli ol la regolinon.
Ho, kiel ofte la afero ŝuldas
nur al la tempo ĝusta sian guston
laŭdindan kaj perfektan!

(Pli laŭte) Ho! Silentu!
Selene dormas kun Endimion',
vekiĝi nevolante.

LORENZO Jen la voĉo
de Portia, aŭ terure mi trompiĝas.

PORTIA Li min rekonas kiel la blindulo
kukolon — per fivoĉo.

LORENZO Sinjorino
karega, estu bonveninta hejmen.

PORTIA Preĝadis ni bonfarton por la edzoj;
kaj ni esperas, ke la preĝoj donis
prosperan vojon. Ĉu revenis ili?

LORENZO Ankoraŭ, sinjorino, ne; sed venis
ekspreso kun anonco pri reveno.

PORTIA Nerissa, vi eniru kaj ordonu
al la servantoj, ke ignoru ili
foreston nian; same vi, Lorenzo
kaj Jessica.

Tamburado.

- LORENZO Alvenas via edzo;
mi aŭdis lian kornon; sinjorino,
ne babilemaj estas ni; ne timu.
- PORTIA Ĉi tiu nokto ŝajnas esti nur
taglumo malsaneta, kvazaŭ tago
kiam la suno tenas sin kaŝita.
*Eniras Bassanio, Antonio, Gratiano kaj iliaj
sekvantoj.*
- BASSANIO Kun Antipodoj devus ni tagiĝi,
se vi sensune volas promenadi.
- PORTIA *(Kaptante torĉon)*
Mi montru lumon, ĝin ne tro flirtante,
ĉar flirtemeco povas vundi edzon,
kaj mi neniam vundu al Bassanio.
Sed Dio ĉiujn gardu! Via moŝto,
bonvenon hejmen!
- BASSANIO Dankon, sinjorino;
vi volu bonvenigi la amikon.
Jen estas tiu viro, jen Antonio,
al kiu senmezure mi ŝuldegas.
- PORTIA Tre decas, ke vi sentu vin ŝuldanto,
ĉar ŝajnas, ke por vi li multe ŝuldis.
- ANTONIO Ne pli ol jam mi estas kvitancita.
- PORTIA Sinjoro, ne per nuraj vortoj devas
aperi, ke vi estas tre bonvena

al nia domo, tial mi preferas
 ŝpareme uzi komplimentojn spirajn.

GRATIANO (*Al Nerissa*)

Per tiu lun' mi ĵuras, ke ofendon
 al mi vi faras. Vere mi ĝin donis
 al tiu skriba homo de l' juĝisto.

PORTIA Ĉu vere jam disputo? Kio estas?

GRATIANO Pri ora rondo, bagatela ringo,
 donaco ŝia, kun ĉizita moto,
 kvazaŭ poeziaĵo tranĉilista
 sur klingo: *Amu min kaj ne forlasu.*

NERISSA Ĉu vi pri l' moto kaj valor' babilas?
 Vi ĵuris, kiam mi al vi ĝin donis,
 ke ĝis la morto mem vi ĝin portados,
 kaj en la tomb' ankoraŭ tenos ĝin.
 Se ne pro mi, almenaŭ pro la ĵuroj
 faritaj tiel energie devus
 vi ĝin zorgege teni. Al skribulo
 juĝista ĉu vi donis? Ne, pro Dio
 juĝisto mia, tiu ricevinto
 neniam portos vangoharojn.

GRATIANO Certe

li portos, se ĝisvivos li virecon.

NERISSA Jes, se virino vivos ĝis vireco.

GRATIANO Nu, pro la mano mia, al junulo
 mi donis ĝin, knabeto sensignifa,

samkreska kiel vi, skribul' juĝista,
knab' babilema, kiu rekompence
ĝin petis, kiel ne al mi konvenus
rifuzi ĝin.

PORTIA

Malkaŝe min paroli
permesu; tre malprave vi forlasis
kun tia facileco la unuan
donacon de l' edzino, la solene
metitan sur la fingron, alforĝitan
kvazaŭ al via karno per la fido.
Mi al amato mia donis ringon,
lin ĵurigante, ke neniam li
forlasos ĝin; kaj tie ĉi li staras.
Pri li mi povas ĵuri, ke neniel
li ĝin forlasus nek de l' fingro tirus
por tuta la riĉeco de la mondo.
Gratiano, vere al edzino via
tro krudanime faras vi ĉagrenon.
Se tion spertus mi, mi furiozus.

BASSANIO

(Flanken)

Plej bone la maldekstran tranĉi for
kaj ĵuri, ke la ringon defendante
la manon perdis mi.

GRATIANO

Bassanio moŝto
fordonis sian ringon al juĝisto
la ĝin petinta, ankaŭ meritinta;

kaj ties knabo, la skribisto, tiam,
ĉar li klopodis en skribado, petis
pri mia; kaj nek homo nek la mastro
akcepti volis ion krom la ringoj.

PORTIA Kaj kiun ringon, Moŝto, vi donacis?
ne tiun, mi esperas, kiun vi
de mi ricevis.

BASSANIO Se al mia kulpo
nur povus mi aldoni la mensogon,
mi malkonfesus; sed al mia fingro
la ringo mankas, jen.

PORTIA Kaj ĝuste tiel
al falsa via kor' la virto mankas.
Ĝis vidos mi la ringon, pro ĉielo,
neniam mi en vian liton iros.

NERISSA Nek mi en vian, ĝis mi vidos mian.

BASSANIO Karega Portia, se vi tiun viron
konus, al kiu mi la ringon donis,
scius pro kiu mi la ringon donis,
ekpensus, kial mi la ringon donis,
kiel nevole mi la ringon lasis,
kiam nenion krom la ringodono
oni akceptus, tiam vi mildigus
la akregecon de ĉagreno via.

PORTIA Se konus vi la ecojn de la ringo,
ŝin dece ŝatus, kiu per la ringo

donacon faris, se vi kun la ringo
honoron vian ligus: for de l' ringo
neniel vi vin lasus detiriĝi.
Ĉu vir' ekzistas tiel senracia,
se iel vi bonvolus per fervoraj
paroloj ĝin defendi, ke pro manko
de diskretemo nepre li insistus
pri aĵo tiel sankte posedata?
Nerissa min instruas, kion kredi;
pro mia vivo, certe tiun ringon
virino ia havis.

BASSANIO

Per honoro,
ne! sinjorino, per animo mia,
ĝin havis ne virino, sed doktoro
juristo, kiu malakceptis trimil
dukatojn kaj de mi pri tiu ringo
petegis. Ĝin unue mi rifuzis
kaj lasis lin foriri ĉagrenite:
la sama viro, kiu de l' amiko
karega mia savis mem la vivon.
Kion mi povis diri, mia kara?
Mi nepre devis ĝin al li postsendi;
min premis honto, pelis ĝentileco;
honoru ne tolerus la makulon
de tia maldankemo. Min pardonu,
afabla sinjorino, ĉar pro jenaj

kandeloj sanktaj de la nokto, certe,
se tiam vi alestus, vi la ringon
de mi elpetus mem, por ĝin donaci
al inda la doktoro.

PORTIA La doktoro
neniam mian domon proksimiĝu!
Ĉar havas li amatan la juvelon,
kiun pro mi vi ĵurpromesis gardi,
mi vin egalos en la donacemo;
al li mi ĉion malavaro: tiun
doktoron mi akceptos en la liton.

NERISSA Kaj mi skribiston lian; gardu do
ne lasi min al mia memprotekto.

ANTONIO Mi estas la malfeliĉega kaŭzo
de tiuj ĉi disputoj.

PORTIA Vi, sinjoro,
bonvena tamen estas; ne malĝoju.

BASSANIO Al mi pardonu, Portia, la nevolan
ofendon; en ĉeesto de ĉi tiuj
amikoj multaj ĵuras mi al vi
per belaj la okuloj viaj mem,
en kiuj speguliĝas mia bildo. —

PORTIA Vi notu tion! En okuloj miaj
duope li rigardas sian bildon,
po unu en okulo ĉiu; bele

vi ĵuru per duobla via bildo
fidindan ĵuron.

BASSANIO Tamen min aŭskultu.
Pardonu tiun kulpon kaj mi ĵuras
per la animo mia, ke neniam
mi plu al vi ĵurrompos.

ANTONIO Mian korpon
mi riskis iam pro bonstato lia,
kaj perdus ĝin, se ne min helpus tiu,
al kiu donis via edz' la ringon.
Volonte mi denove min implikos,
garantiante per animo mia,
ke via edzo jam ne plu promeson
perfidos kun intenco.

PORTIA Do vi estu
garantianto lia. Al li donu
ĉi tion, kun admono, ke pli bone
li gardu ĝin, ol la unuan.

ANTONIO Moŝto
Bassanio, ĵuru gardi jenan ringon.

BASSANIO Ĝi estas, pro ĉielo! tiu sama,
kiun al la doktoro mi donacis.

PORTIA Pardonu min, Bassanio, ĝin ricevis
mi de l' doktoro. Ĉiuj vi miregas.
Sed jen letero; laŭ oportuneco
ĝin legu; ĝi el Padova, de Bellario

venas; kaj tie trovos vi, ke Portia mem estis la doktoro, kaj Nerissa skribisto ŝia; tiu ĉi Lorenzo atestos, ke mi tuj post vi ekiris kaj ĵus revenis; mi ankoraŭ ne eniris mian domon. Vi, Antonio, tre bonveninta estas; kaj mi havas por vi bonegan pli ol vi atendas sciigon; sen prokrasto desigelu leteron jenan. Vi per ĝi ekscios, ke tri el la ŝipegoj viaj riĉaj neatendite naĝis en havenon.

ANTONIO Mutulo mi fariĝis.

BASSANIO Ĉu vi estis tiu doktoro kaj mi vin ne konis?

GRATIANO Kaj ĉu vi estis tiu fi-tromponta skribisto?

NERISSA Sed li ne intencas trompi, escepte se mi vivos ĝis vireco.

ANTONIO Aminda sinjorin', al mi vi donis ne sole vivon, sed la vivrimedon; ĉar tie ĉi mi legas kun certeco, ke miaj ŝipoj ankris en la rodo ekster danĝero.

PORTIA Nun al vi, Lorenzo, skribisto mia portas kontentigon.

- NERISSA** Jes, kaj sen rekompenco mi ĝin portas.
Jen donas mi al vi kaj Jessica
donacan akton de l' hebreo riĉa
intence restigantan testamente
la tutan lian havon, ĉe mortigo.
- LORENZO** Afablaj sinjorinoj, vi survoje
manaon ŝutas al malsateguloj.
- PORTIA** Tagiĝos baldaŭ, tamen vi ankoraŭ
ne plene aŭdis ĉiujn faritaĵojn.
Ni do eniru kaj nin ŝarĝu tie
kvazaŭ per tribunalesta ĵuro,
kaj tre vereme ni respondos ĉion.
- GRATIANO** Bedaŭras mi, ke nur du horoj restas
ĝis la tagiĝo, ĉar Nerissa eble
preferos ĝis sekvanta nokt' atendi.
Tamen, dum vivos mi, mi ĉiam timos
nenion pli fortege, ol la taskon
konservi la ringeton de Nerissa.
Ĉiuj eliras.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-199-2